

Esperanto

Internacia

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Vol. 3. N-ro 2

Februaro 1939

Vivo de Zamenhof

Edmond PRIVAT



2a eldono. — 134 paĝoj kaj 12 ilustraĵoj.

Broŝ. 2 ŝ. 6 p., bind. 3 ŝ. 6 p., aŝranko 4 p.)



« Granda nombro da bildoj sur kreta papero. Fama verko de fama aŭtoro. Stilo ne atingita ĝis nun de alia verkisto : lego de iu ajn paĝo alportas plej altan ĝuon al ĉiu lingvoscianto. Resume : Fiero de nia literaturo. La libron bele ekipitan devus havi ĉiu Esperantisto, kion ebligas la relative tre malalta prezo. »

Ligilo (Ĉeĥoslovakujo).



Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY Ltd., ANGLUJO

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo,
aŭ via kutima esperantista librovendisto.

Ŝlosiloj

estas eble la plej utilaj propagandiloj. Ĉu vi posedas ekzempleron de la

SUD-APRIKA SLOSILO ?



Ni sendos unu ekzempleron kontraŭ unu respondkupono aŭ kvar kontraŭ tri respondkuponoj.



INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.),
Anglujo.

ISMAEL GOMES BRAGA :

Veterano ?

(2. VI. 1937)



124-paĝa, klare presita, plaĉe aranĝita. Tre simpatia eldonaĵo, libro valora por ĉiu esperantisto, fonto de entuziasmo kaj de firma konvinkigo, el kiu plezure ĉerpos ĉiu samideano — veterano kaj novulo.

Prezo : broŝurite :

0.80 ned. guld. (inkl. sendkostoj) ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando ;

1 s. 9 p. ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

DIDAKTA

Ilustrita Lernolibro de Esperanto por praktika komenca kurso, de

DELFI DALMAŬ, L. K.



La vortoj kaj la temoj de la ekzercaro estas elektitaj por tuja uzeblo. Oni lernas senkonscie la gramatikajn regulojn de Esperanto.

Prezo : 4 respondkuponoj, aŭ 1 ŝilingo, aŭ frankite.

Kataluna Antologio

kompilita de

JAUME GRAU CASAS, L. K.

Verko aprobita de la
Esperantista Akademio

Bonega elekto el la
kataluna literaturo

*416 grandformataj paĝoj
Prezo broŝ. 6 s. 9 p., aŭfranko 6 p.*

MENDU ĈE

**Internacia Esperanto-Ligo
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo**

Esperanto

Internacia

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Eldonanto: Internacia Esperanto-Ligo
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Adreso de la Redakcio: Teo JUNG,
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl.

Vol. 3. N-ro 2

Februaro 1939



S-ano Ismael Gomes Braga antau la mikrofono

Sur p. 34 de tiu ĉi numero li rakontas al niaj legantoj pri la situacio de nia afero en Brazilo.

Starbim

ISMAEL GOMES BRAGA :

ESPERANTO EN BRAZILO

Post longa dormado Esperanto dum la lastaj jaroj tre senteble vekigis en Brazilo.

En grandega unulingva teritorio kiel Brazilo, la Esperanta propagando ne povas uzi la samajn argumentojn kiel en Eŭropo, ĉar ne estas sentataj la samaj bezonoj.

Ni ne sentas inklinon lerni fremdajn lingvojn, ĉar nia nacia idioma ŝajnas al ni sufiĉa por ĉio. Se alilandano enmigras en nian landon, lia unua devo estas lerni la « korektan parolmanieron » de la enloĝantoj, sed ni havas nenian devon lerni alian nacilingvon por lin kompreni; tial la homama argumento de eŭropanoj pri lingvo internacia malbonefikas ĉe ni. Nia koncepto pri alilandano estas fondita sur la sperto pri malriĉaj, malkleraj enmigrintoj, kiuj barbare kripligas nian nacian lingvon. Varbi niajn samlandanojn al lernado de lingvo internacia por kompreni tiajn kompatindajn estaĵojn ne estas facila laboro. Nia vojo devas esti tute alia. Ni devas celi nur la klerajn homojn, la verkistojn, la sciencistojn, ĉar nur tiuj ĉi lastaj povas kompreni kaj senti la bezonon de lingvo internacia, nur ili plene scias ke alilingvanoj ofte estas kleraj, eminentaj homoj, kies scio povas grande nin helpi, kaj ne nur malkleraj enmigrintaj kamparanoj.

Por trafi tiun malgrandan parton de nia socio, la intelektularon, la sola trafa argumento estas **la libro**, la plej bona libro en Esperanto. Nia lingvo devas aperi antaŭ iliaj okuloj kiel grava kulturlingvo en plena uzado, kun tuja utileco por ili. Tre simpla nia propaganda laboro en teorio, ĉar ĝi devas konsisti nur en prezentado de belaj, bonaj, rimarkindaj libroj en Esperanto. Da tiaj nia literaturo jam posedas kuraĝigan kolekton, do la afero fariĝas simpla komerco de libroj... Precize tie kuŝas praktika malfacileco: la libroprezco! Esperantaj libroj estas

karegaj, ili kostas kvinoble kiom brazila libro en nacia lingvo! Novan baron ni trovas: lerni Esperanton por pagi alt-egajn prezojn, ne estas granda tentado!

Mi faras interesan provon, kiu plene kontentigas min ĝis nun: mi presigis enlande malkarajn librojn por granda disvastigo kaj importis ĉiujn pli belajn librojn el aliaj kontinentoj nur kiel dokumentojn pri la tuja utileco de Esperanto kiel kulturlingvo.

Dank' al tia propaganda organizaĵo nia librokomerco naskiĝis antaŭ unu jaro kaj tre rapide prosperas kaj kreskas.

Diversaj novaj societoj fondiĝas tra la tuta lando, kaj espereble post du-tri jaroj ni havos unu el la plej viglaj movadoj en la mondo.

Antaŭ du jaroj ni havis neniun gazeton, neniun societeton en aktiveco. Tomba silento envolvis nin. Nun tri-kvar gazetoj regule aperas, Tipografia Esperantista S. A. prosperas, novaj lernolibroj aperas kvaronjare, la neŭtrala gazetaro raportas favore.

Kiel kulturlingvo Esperanto estas necesa ankaŭ al ni, eĉ tre necesa. La estonteco de Esperanto en nia kontinento dependas de la libro, kaj feliĉe la Esperanta libro jam ekzistas kaj ĉiutage prosperas.

Mia sperto pri Brazilo laŭŝajne estas simila en la tuta Ameriko, ĉar nenia amerika lando sentas bezonon de lingvo internacia por la ĉiutaga vivo, kiel okazas en Eŭropo. La eŭropa laboro plej utila al ni ĝis nun estas la libro, kaj espereble en proksima estonteco **ankaŭ la radio-programoj** el Eŭropo nin trafos kaj helpos. Ĝis nun ni preskaŭ nenion aŭdas en Esperanto el eŭropa radio, ĉar la grandegaj mallongondaj stacioj tute ne uzas nian lingvon, kaj ili havas bonegajn, ĉiutagajn programojn en niaj naciaj lingvoj: portugala, hispana kaj angla.

Internacia Konkurso 1939

Kiel por la pasintaj jaroj, tiel ankaŭ por la nuna jaro nia Internacia Esperanto-Ligo starigis konkurson, jam konatan sub la nomo « Internacia Konkurso ». En 1937 tiun konkurson gajnis la Norvega Esperantista Ligo, en 1938 gajnis ĝin la Svisa Esperanto-Societo. Kaj kiu estos la gajnanto de la I. K. 1939?

Ĉiu asocio havas la ŝancon. Uzu ĝin! Jen la reguloj por la nova Konkurso:

1. Por ĉiu membro, aliĝinta al IEL, estas donitaj (resp. donotaj) poentoj laŭ jena tabelo:

Asocia Membro	1
Membro kun Jarlibro	5
Membro-Abonanto	10
Membro-Abonanto-Heroldo	12
Membro-Subtenanto	15
Dumviva Membro (nova)	50
Patrono	50
Entrepreneo	10
Vendo de kuponlibreto	5

2. La elirbazo estas la stato je la fino de 1938, laŭ jena tabelo:

Argentino	309
Aŭstralio	489
Belgiujo	1747
Brazilo	429
Britujo	6594
Bulgarujo	451
Ĉeĥoslovakujo	930
Danujo	1038
Finnlando	250
Francujo (inkluzive de Alĝerio, Hindocinujo kaj Madagaskaro)	5503
Grekujo	250
Hispanujo	885
Hungarujo	574
Italujo	561
Japanujo	517
Jugoslavujo	694

Nederlando	3253
Norvegujo	1060
Nov-Zelando	444
Polujo	683
Portugalujo (inkluzive de Acoroj, Madeira kaj Port. Hindujo)	303
Svedujo	3215
Svislando	693
Usono	1597

Oni notu, ke nun partoprenas nur landoj kun minimuma elirbazo de 250 poentoj. Aliaj landoj povas partopreni, kondiĉe ke ili akceptu tiun minimumon.

3. Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando aŭ regiono, kiu montros la plej bonan progreson dum la jaro, kompare kun la supraj ciferoj, IEL donos premion de £ 10/- (200 svisaj frankoj) kaj artan diplomon. Plue, al ĉiu Delegito en la koncerna regiono ni sendos libro-premion.

Varbgarantiantio 1939

Ĉu vi jam faris vian promeson esti Varbgarantiantio 1939? En la nuna kriza tempo kun ĝiaj internaciaj malfacilaĵoj estas necese, ke ni esperantistoj laboru konstante sed per malgrandaj rimedoj. Ĝuste tial ni penadu esperantistigi po unu novan konatulon. Kaj atentu: Ne propagandu Esperanton inter ĉiuj viaj konatoj, sed elektu unu el ili, kaj esperantistigu lin aŭ ŝin!

Varbgarantiantio: Venkogarantiantio!

IEL-membroj en 61 landoj

En 1938 estis 360 individuaj membroj pli ol en 1937

Se ne estus en 1938, pro konataj kaŭzoj, por IEL perditaj la membroj en Aŭstrujo, kaj granda parto de la membroj en Ĉeĥoslovakujo kaj Japanujo, nia Ligo estus fininta la jaron kun pli ol 14.000 membroj. Nun ĝi atingis iom pli ol 13.000 membrojn en 61 landoj; sed troviĝas inter ili pli ol 3000 **individuaj** membroj. Do, kvankam tiu stato ankoraŭ tute ne estas fieriga, tamen en la nunaj cirkonstancoj oni preskaŭ ne povas atendi pli multe.

Post pli ol du-jara laborado de IEL oni povas hodiaŭ plenprave aserti, ke la neŭtrala esperantistaro rekolektiĝis, ke la situacio de nia internacia organizo konsolidiĝis, kaj ke la esperantistaro rilatas al

sia Ligo kaj ĝiaj organoj kun plena fido kaj konfido. Tion pruvas ankaŭ la fakto ke la kotizoj por la nova jaro eniris, kaj ankoraŭ eniras, multe pli nombre kaj pli akurate ol en la komenco de 1938, tiel ke la oficejo en la IEL-Domo en Rickmansworth dum tiuj ĉi semajnoj kaj monatoj apenaŭ konas paŭzon en la laboro.

Se ĉiu sekvos la alvokon de s-ro Malmgren, varbante en la daŭro de 1939 **nur unu novan esperantiston** kaj aligante lin kiel individuan membron al IEL, la stato de nia Ligo en la fino de la nuna jaro povos esti nur brila.

Membroj pagintaj ĝis la 31a de Decembro 1938

	AM	MJ	MA	MAH	MS	Pat.	DM	HM	Sumo	Ent.
Acoroj	—	1	—	1	—	—	—	—	2	—
Argentino	—	10	19	2	3	—	—	—	34	—
Aŭstralio	—	8	32	7	3	—	1	—	51	—
Aŭstrujo	—	17	19	3	—	—	2	1	42	—
Belgujo	330	42	88	16	7	—	3	1	487	3
Borneo	—	—	—	—	—	—	1	—	1	—
Brazilo	73	23	16	3	3	—	—	—	118	—
Britujo	1222	303	185	51	51	9	17	4	1842	13
Bulgarujo	—	31	17	8	2	—	—	—	58	—
Ĉeĥoslovakujo	344	78	82	18	4	—	2	2	530	1
Ĉinujo	—	—	2	1	—	—	—	—	3	—
Danujo	300	23	47	9	3	—	1	1	384	—
Egiptujo	—	2	1	—	—	—	1	—	4	—
Estonujo	—	3	1	—	—	—	—	—	4	—
Finnlando	—	4	1	6	—	—	—	—	11	—
Francujo	2458	273	125	15	8	1	11	9	2900	4
Germanujo	—	1	4	—	—	—	2	—	7	—
	4727	819	639	140	84	10	41	18	6478	21

	4727	819	639	140	84	10	41	18	6478	21
Gibraltaro	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Grekujo	—	—	—	—	—	—	—	1	1	—
Havajo	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Hindoĉinujo	—	3	1	—	—	—	—	—	4	—
Hindujo	—	—	—	—	1	—	—	—	1	—
Hispanujo	325	4	54	—	—	—	2	1	386	—
Hongkongo	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Hungarujo	—	22	26	12	—	—	1	2	63	6
Irlando	—	4	—	—	—	—	—	—	4	—
Islando	—	—	2	1	—	—	—	—	3	—
Italujo	230	12	13	8	3	—	4	2	272	—
Japanujo	200	12	17	6	1	—	—	—	236	—
Jugoslavujo	170	36	17	12	2	—	—	—	237	—
Kanado	—	5	3	2	—	—	1	—	11	—
Kenjo	—	—	1	—	—	—	1	—	2	—
Kolombio	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Kongo	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Latvujo	—	8	4	3	—	—	—	—	15	—
Litovujo	—	2	12	2	1	—	—	—	17	—
Luksemburgo	—	1	1	—	—	—	—	—	2	—
Madagaskaro	—	1	1	—	—	—	—	—	2	—
Madeiro	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Maroko	—	1	2	3	—	—	—	—	6	—
Meksiko	—	—	2	—	—	—	—	—	2	—
Monako	—	3	—	—	—	—	—	—	3	—
Nederlandindio	—	2	4	1	2	—	—	—	9	—
Nederlando	1200	123	70	34	18	1	3	—	1449	1
Norvegujo	620	46	12	5	2	—	1	—	686	—
Nov-Zelando	142	39	8	1	1	—	3	—	194	—
Palestino	—	9	1	—	—	—	—	—	10	—
Papuo	—	—	—	—	—	—	2	—	2	—
Polujo	151	33	22	11	1	—	2	1	221	—
Portugalujo	—	4	22	3	—	—	1	—	30	—
Rodezio	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Rumanujo	—	4	1	1	—	—	—	—	6	—
Siamo	—	—	1	—	—	—	—	—	1	—
Sovet-Unio	—	—	—	—	1	—	1	—	2	—
Sud-Afriko	—	3	2	1	—	—	—	—	6	—
Svedujo	1879	103	53	23	1	—	1	1	2061	—
Svislando	200	41	14	9	2	—	4	1	271	1
Trinidado	—	—	—	1	—	—	—	—	1	—
Turkujo	—	5	—	1	—	—	1	—	7	—
Urugvajo	—	—	5	1	—	—	—	—	6	—
Usono	139	88	61	19	12	—	4	3	326	—
61 landoj	9983	1433	1076	302	132	11	73	30	13040	29

Komparaj ciferoj je la 31a de Decembro 1937 :

10790 1192 1001 250 135 13 75 31 13487

Unueco estas Forto

Rezulto de la Konkurso 1938

SVISLANDO GAJNIS LA PREMION

Kiel en 1937, tiel ankaŭ en 1938 Internacia Esperanto-Ligo aranĝis la t. n. « Internacian Konkurson », kies premio konsistas en kontanto de £ 10 (200 sv. frankoj) por la gajninta asocio kaj valora libro por ĉiu delegito en la koncerna lando. Pasintan fojon la feliĉa gajninto estis la Norvega Esperantista Ligo, kiu sukcesis, en 1937 plibonigi sian staton je 660 %, kompare kun 1935. La nova konkurso (por 1938) havis kiel bazon la staton de 1937.

Estas speciale ĝojige ke la premion de ĉi tiu nova konkurso sukcesis akiri por si la Svisa Esperanto-Societo, kiu atingis preskaŭ 506 % de la baza stato de 1937. Mallonge post ĝi sekvas Bulgarujo kun 490 %, kie nia movado en la lasta tempo faris tiel bonan progreson. Kiel tria sekvas Jugoslavio kun 270 %. Atentinde estas ke ankaŭ Norvegujo ankoraŭ je 34 % plibonigis sian staton de 1937! Entute ni vidas ke, kvankam la tutnombro de la membroj restis iom malantaŭ la nombro de 1937 (13.040 anstataŭ 13.487), la situacio de IEL ĝenerale pliboniĝis en la pasinta jaro (1938) kompare kun la antaŭpasinta (1937), ĉar konsiderinde pli grandigis la nombro de la kategorioj MJ, MA kaj MAH.

Tamen la stato ankoraŭ ne estas kontentiga. Ĉu en 1939 ne estos eble, atingi minimume 15.000 membrojn de IEL entute, kaj inter ili minimume 5.000 MJ, MA kaj MAH?

Ni plej kore gratulas la Svisan Esperanto-Societon pro ĝia bona laboro, kaj ankaŭ ĉiujn ceterajn asociojn, kiuj atingis minimume 100 % de sia antaŭa stato. Kaj niajn plej bonajn dezirojn al ĉiuj por la sekvanta konkurso.

Jen la finaj ciferoj pri la Internacia Konkurso 1938:

	Poentoj		
	1937	1938	0/0
1. Svislando	137	693	505.8
2. Bulgarujo	92	451	490.2
3. Jugoslavujo	257	694	270.0
4. Polujo	318	683	214.7
5. Latvujo	55	116	210.9
6. Nov-Zelando	265	444	167.5
7. Finnlando	61	102	167.2
8. Norvegujo	792	1060	133.8
9. Litovujo	135	169	125.2
10. Nederlande	2837	3253	114.6
11. Aŭstralio	429	489	114.0
12. Kanado	74	79	106.7
13. Svedujo	3024	3215	106.3
14. Usono	1513	1597	105.5
15. Belgujo	1722	1762	102.3
16. Britujo	6483	6604	101.8
17. Sud-Ameriko	851	864	101.5
18. Portugalujo	317	303	95.6
19. Francujo	5907	5539	93.8
20. Danujo	1118	1038	92.8
21. Hungarujo	619	574	92.7
22. Italujo	636	561	88.2
23. Rumanujo	50	42	84.0
24. Ĉeĥoslovakujo	2449	1840	75.1
25. Afriko	137	99	72.3
26. Azio	1321	793	60.0

FERVORAJ I.E.L.-ANOJ

legas « Heroldon de Esperanto », la

SEMAJNAN



organon de Internacia Esperanto-Ligo, kiu ĵus komencis sian 20-an eldonjaron.

Petu 3 provnumerojn kaj librokatalogon kontraŭ unu respondkupono de la eldonejo

HEROLDO DE ESPERANTO

Harstenhoekweg 223

SCHEVENINGEN (Nederlando)



Nia Esperanto-Filmo

« **Subtenu la Verdajn Stelojn dum 1939!** » estas la novjara saluto kaj admono de niaj aŭstraliaj gesamideanoj Jack kaj Vee Couche en **St. Peters, Suda Aŭstralio**. (Supra bildeto.) Gesamideanoj ĉie tra la mondo, sekvu tiun ĉi admonon!

Kiom esperantlingvaj propagandiloj efikas ankaŭ ĉe multaj neesperantistaj okazoj, montras la dua bildo, prezentanta anguleton el la **Esperanto-sekcio de la internacia filatelieja ekspozicio « Brapex » en Rio-de-Janeiro**. Maldekstre oni vidas parton de la esperantlingva korespondantaĵaro, kiu atingis la direkcion de la ekspozicio. Meze estas propagandaj glumarkoj. Dekstre esperantlingvaj turismaj propagandiloj el Nederlando, Svedujo, Danlando, Svislando ktp.

Esperantistoj sentas sin bone ankaŭ en fremda lando. La tria bildeto montras grupon da **danaj geesperantistoj** en rondo de siaj gesamideanoj en **Volendam (Nederlando)**. Oni atentu la kelnerinojn en la ĉarma Volendama popola kostumo. (Foto: Kramer.)

La kvara bildo rememorigas la ĉeestintojn de la 30-a Universala Kongreso pri la agrabla semajno pasigita en Londono. **Sveda samideano kaj ĉeĥa samideano** en siaj belaj naciaj kostumoj. La ĉeĥo estas s-ro Johano Geryk, kiu ĝojigis la kongresanojn per sia arta violonludo. (Foto: Baxter.)

Fine, kiu estas tiu homo kun la cigaredo en la buŝo, kaj kion li estas faranta? Bedaŭrinde la formato de la « filmo » devigis nin, fortranĉi liajn kruojn, buston kaj manojn. Des pli interesa fariĝis la enigmo. Ĉu ni malkaŝu ĝin? Nu, li estas neniu alia ol la ĉiam agema **ĝenerala sekretario de nia Internacia Esperanto-Ligo, s-ro C. C. Goldsmith**, kaj momente (sur la bildo) li estas akceptonta en sian monujon la aliĝkoton de nove varbita samideanino. Tio, cetere, estas lia preferata okupo. Sed aliĝkotojn li volonte akceptas ankaŭ per poŝto. (Foto: Baxter.)

JOSEPH R. SCHERER, Prez. de EANA :

Esperanto en grava Filmo Kial M.G.M. uzis Esperanton?

Konfidenca letero al ĉiuj Esperantistoj

Ne por traduko al nacilingvaj gazetoj!

(Verkita por ĉiuj Esperanto-gazetoj kiuj deziras uzi la enhavon.)

Alvenis centoj da leteroj (1) kun gratuloj al s-ro Brown kaj al mi kun diversaj demandoj. La ĉefaj demandoj estas: KIAL la filmfarejo M.G.M. uzas Esperanton, kaj KIAL estas uzata tia **stranga titolo???** Ĉu la malamikoj de Esperanto ne havos oportunon por diri « Jen vidu — idiotoj parolas Esperanton en filmo »...?

Tiujn ĉi demandojn mi povas respondi nur en konfidenca letero al la gesamideanoj, kaj tradukoj estu farataj nur de tre spertaj ĵurnalistoj kiuj bone komprenas la publikon kaj la nacian sentadon en la nuna periodo.

Sekvos aliaj artikoloj pri intervjuoj kun la reĝisoro, pri interbabiladoj kun Norma Shearer, Clark Gable, Joseph Schildkraut, pri la instruado de la Esperanta teksto al la geaktoroj, pri la filmado mem ktp. (Dum du monatoj mi konstante estis kun la filmsteloj kaj povis al ili paroli pri Esperanto, pri la utilo de nia lingvo dum miaj mondvojaĝoj, pri la stulteco de kunvenoj de ĉefministroj kiuj ne parolas neŭtralan lingvon ktp.)

Sed mi ne havis la permeson de la filmfarejo aperiĝi iajn artikolojn antaŭ la apero de la filmo sur la usonaj ekranoj. La filmo aperos plej verŝajne dum januaro aŭ februaro, kaj en Eŭropo dum la printempo. Pro la sensacia aktualeco de la enhavo, la filmo eble aperos en la eŭropaj ĉefurboj jam en la malfrua vintro.

Ĉar mi ricevis salajron de M.G.M., mi devis, kompreneble, obei, kaj ne povis tute libere agi kiel sendependa ĵurnalisto.

(1) La leteroj kun tre multaj subskriboj faris la plej grandan impreson.

Sed post apero de la filmo mi povas informi la mondon pri ĉiuj detaloj. Dume mi komencas hodiaŭ per « klarigoj pri la KIALoj ».

Mi devas konfesi ke la titolo estas tikla. Pri tio mi klarigos pli sube. Same tikla estas la KIALo, pro kiu oni uzis Esperanton. Pro tio mi devas petegi la samideanojn ke ili estu prudentaj, kaj ne detruu la propagandan valoron de la filmo por Esperanto per aperigo en naciaj gazetoj de la tiklaj KIALoj en ĉiuj detaloj. Kiel mi jam diris, nur spertaj ĵurnalistoj, kiuj konas la **emociojn kaj sintenadojn** de siaj patrolandanoj, kuraĝu ion traduki.

Kaj ĉiuj Esperantaj gazetoj, kiuj deziras informi siajn legantojn, nepre ankaŭ aldonu koncernajn avertojn (esperantlingve) pri la danĝeroj.

★

La filmo portas la saman titolon kiel sensacia teatraĵo kiu montras la terurajn rezultojn de senbrida armado. Agento de municio-fabrikejoj kaŭzas « incidentojn » alterne en diversaj mondpartoj, por ke la registaroj mendu pliajn mortigilojn. La agenteo tamen senkulpigas sin per la demando kiuj estas la pli grandaj kulpoj: la fabrikantoj aŭ la aĉetantoj kiuj UZAS la mortigilojn.

Fine aeroplanoj, tuta armeo da ili, eksplodigas najbarlandan grandurbon kun miriga akurateco. Spite de sufiĉe frua mallumigo de la ĉefurbo, la bombardado sukcesas kun neimagita, timiga precizeco pro tio, ke agenteoj kaj spionoj ekbruligas domojn, tiel ke vidiĝas kolosa fajra kruco en la urbo. Helpe de ĝi facile detruigas la plej gravaj distriktoj.

Norma Shearer kaj Clark Gable, du usonanoj, kaj aliaj turistoj estas kaptitaj en sennoma eŭropa lando kie la loĝantoj ĉiuj parolas Esperanton inter si. Homaj emocioj alternas kun klopodoj amuzigi la malfeliĉulojn per dancoj kaj prezentaĵoj de ses mirinde belaj usonaj blondulinoj kiujn gvidas Clark Gable tra Eŭropo. Alterne ploras la koro pro emocio kaj jen ĝi ridegas pro tre amuzaj situacioj...

Estas vera Tragedio-Komedio... kiu estos sensacia sukceso, ne nur pro la du gravaj steloj, sed certege pro la sensacie interesa kaj aktuala enhavo.

Oni faris specialan eldonon por Eŭropo. Oni ellasis la plej fortajn kritikojn kontraŭ militaristoj. Sed la agoj en si mem montras jam sufiĉe la mizeron kaj donas la intencitan impreson. Hollywood finfine preferas mem ellasi tro « malafablajn vortojn » kaj sendi al Eŭropo perfektan, harmonian produkton, anstataŭ riski malartistan distranĉadon de la filmo per eltranĉado de nedezirataj frazoj.

Kaj nun en la « Sennoma Lando » la loĝantoj, oficiroj, hotelistoj ktp. parolas Esperanton. Neŭtrala lingvo por Sennomlando! Tiel la filmfarejo **volis eviti ofendon al iu eŭropa lando**. La teatraĵo mokas diktatorojn; la filmo nur montras la rezultojn de fanatika armado. En la teatraĵo la loĝantoj parolas okaze la lingvon de sudeŭropa lando; la filmo ne povas impliki kaj insulti iun ajn landon.

Verŝajne neniu lando kun diktatoro permesos la montradon de tiu ĉi filmo. Tamen la filmkompanio ne volis eĉ riski malpermeson de la filmo pro insulto al eĉ nur najbara lando.

Kaj do... ĉu ne mirinda solvo?... la filmreĝisoro Brown pensis pri la uzo de Esperanto. Dum dek jaroj mi denove kaj denove rekomendis nian lingvon por la filmo, kaj parolis kun diversaj reĝisoroj, steloj kaj eĉ kun la filmfareja prezidanto Carl Laemmle.

Kaj nun subite sukceso: Esperanto **SERVAS** kaj **UTILAS** por malrekte fari propagandon por **PACO**.

Mi ne ŝatas la ideon ke la publiko ekpensu ke Esperanto servus kiel **nacia** lingvo de iu certa lando; kaj mi ne ŝatas

ke la loĝantoj de **militema** lando uzu Esperanton.

Sed ni Esperantistoj devas esti pretaj pardoni la mallogikecon de la situacio. Fakte ni ja ne povus malpermesi la uzon de Esperanto al iu. Ni gajnos per tiu filmo..., se la gesamideanoj bone eluzos la bonŝancon.

200-300 milionoj da homoj, minimume, venos al la filmo « **Idiot's Delight** » pro tio ke ludas en ĝi **DU** gravaj steloj — Clark Gable kaj Norma Shearer. Mi dankis al ili, ofte dum la filmado, en la nomo de la tutmonda Esperantistaro pro tio ke per siaj arto kaj tutmonda famo ili logos centmilionojn da homoj al la kinejoj. Vole-nevole la publiko devos aŭskulti nian lingvon, kaj povos konvinkigi ke Esperanto **ESTAS FAKTE** bela, muzika kaj povas esti parolata same facile kaj fluege kaj nature kiel iu ajn alia bela lingvo.

Filmo tute en Esperanto ne helpus al la filmfarejo, ĉar venus tro malmultaj homoj; kaj tia filmo ankaŭ ne helpus al la Esperanto-movado (tiom kiom « **Idiot's Delight** » helpos), ankaŭ ĉar venus tro malmultaj homoj.

Aliflanke filmo, en kiu Esperanto estas nur parte uzata, multe pli helpos al nia movado en la nuna momento. Ni ne estu tro egoistaj postulante jam nur filmojn tute en Esperanto. Ni estu dankemaj pro la bonŝanco kiun prezentas al ni M.G.M. Nia movado ŝuldos senfinajn dankojn al la du steloj, al la reĝisoro kaj al la filmfarejo, ĉar la kombino de ili allogos centmilionojn da kinovizitantoj.

M.G.M. aĉetis la filmrajton de « **Idiot's Delight** » por sumo ne publike konata, sed tamen estimata je cent mil dolaroj, aŭ eble eĉ \$ 150,000.— Okaze de la aĉeto de la filmrajto neniu pensis pri Esperanto. Nur kiam montriĝis la malfacilaĵo pri la lingvo, la estroj komencis pripensi. Kion fari?

La filmrajto estis kolosa kosto... kaj oni ne volis forjeti ĝin pro la tikla lingva problemo. Tamen dum kelka tempo la aĉetita filmrajto aspektis kiel neuzebla « blanka elefanto ».

Filmo tute en Esperanto estas ankoraŭ tro antaŭtempa. Sed kial ne **eksperimente**

uzi Esperanton? Tio ŝajnis esti pli bona solvo ol fabriki lingvaĵojn.

Estus pli danĝere fabriki lingvaĵojn, ĉar certege ĝi estus tro simila al jam ekzistanta nacia lingvo. Kaj certege tiu lando plendegus ke oni insultis ĝian nacian honoron. Krome la fabrikado de tia lingvo kostus pli da tempo kaj mono ol simpla uzo de jam uzata lingvo, kiu estas **KONATA KIEL NEUTRALA LINGVO**, kiel nia Esperanto.

Eĉ se la rusa lingvo estas simila al la pola, Polujo ne povus protesti dirante ke oni ofendis Polujon per la uzo de la tro simila rusa lingvo. Same neniu lando povos plendi ke oni emis insultojn ĝin per la uzo de la trosimila Esperanto.

Do Clarence Brown decidis uzi Esperanton. Pro tio li fariĝis unu el la plej gravaj patronoj de la Esperanto-movado. Mi volus preskaŭ nomi lin « **film-onklo de la Esperanto-movado** ».

Aliaj filmfarejoj sekvos, same certe kiel sekvos nova tago post vesperiĝo. Sed Clarence Brown estos nomo kiu restos fama en la Esperanto-movado por ĉiam. Pri miaj intervjuoj kun li dum kunlaborado ĉe la filmigo de « *Idiot's Delight* » mi verkis apartan artikolon. Nur mi ankoraŭ ne rajtas sendi ĝin al « *Heroldo* » kaj, pere de ĝi, al la Esperanto-gazetaro.

★

Kaj nun pliajn klarigojn pri la titolo « *Idiot's Delight* ». La titolo havas valoron de kelkaj centmildolaroj. La teatraĵo estis sensacia sukceso en multaj mondpartoj kaj precipe tra tuta Usono. Sangdo de la titolo en Usono estus senseca, kvankam eĉ en Hollywood neniu scias ekzakte kial la aŭtoro de la teatraĵo elektis tiun titolon.

Ŝajnas al mi ke la aŭtoro volis diri, ke tro fanatika armado estas amuzo de idiotoj. Sed malamikoj de Esperanto povus rikane kaj malice diri, ke en la filmo idiotoj parolas Esperanton.

Pro tio, en la traduko de la titolo, mi preferas uzi la **adjektivan vorton** «idiota» kaj pliklarigi la duan vorton por montri pri kio temas: « militamuzo ».

Certe la titolo « **Idiota Militamuzo** » ne aludas al la Esperantistoj. Sed ĝi povus havi danĝeron por la filmo. La kino-

teatroj en certaj landoj eble preferos NE menci la vorton « milito » por ne akiri la antagonismon de sialandaj armeestroj. Kaj en tiuj landoj, kie oni persekutas pacifistojn, reklamo kaj varbado por filmo kun la titolo « **Idiota Militamuzo** » povus fari domaĝon al la loka Esperantomovado kaj al la filmo. En tiuj landoj la iom pli nebula titolo « **Idiota Amuzo** » certe taŭgos pli bone.

Do « **Idiota Militamuzo** » aŭ « **Idiota Amuzo** » estu la titoloj por la kolosa mondfilmo « *Idiot's Delight* » depende de la landoj, en kiuj loĝas la samideanoj.

Estos pli bone ke la samideanoj sukcesu allogi ĝeneralan publikon grandamase al la filmo (por varbi por Esperanto kaj por la pacideo)... anstataŭ akiri la persekutadon de la loka klubo kaj eventuale — ĝuste per nia klopodo — malpermesigon de la filmo.

Pro tio mi ne povas sufiĉe forte ripeti kaj ripetadi, ke miaj gesamideanoj estu PRUDENTAJ, saĝaj kaj diplomataj.

Sen prudento nur domaĝo estas farata, kaj nenio gajnata. Ni ankaŭ montru dankemon al la filmfarejo per saĝa eluzo de nia oportuno. Klarigoj kaj argumentoj en tiu ĉi artikolo kompreneble ne estu transdonataj al la cetera publiko.

★

Mi ŝatus vidi la suprajn klarigojn en aliaj Esperantaj gazetoj sed ĉiam KUN AVERTOJ pri danĝeroj evitindaj (eĉ se la artikolo aperas en ekstrakto aŭ nur parte). Kaj estus tre preferinde ne traduki ion por naciaj revuoj. Taŭgaj artikoloj kun multaj interesaj klarigoj pri la filmo mem aperos baldaŭ... kaj ilin vi povos traduki. Mi ripetas: agu prudente kaj diplomate!

EN VIA PROPAGANDO POR ESPERANTO

estu ĉiam verema! Neniam troigu, neniam blufu! La Esperanto-movado jam estas tiel forta, ke blufon ĝi ne bezonas.

Dek Jarojn A. E. K.

Antaŭ dek jaroj fondis kelkaj junaj studentoj, kiuj apenaŭ finis la mezlernejon, la Akademian Esperantistan Klubon, kiu havis la taskon propagandi Esperanton inter la studentaro de la Zagreba Universitato. La laboro komenciĝis kun modestaj monrimedoj, la kluba ejo estis diversaj kafejoj, kaj kelkaj komitatanoj-fondintoj preskaŭ eĉ ne sciis Esperanton. Sed iom post iom, post longa kaj persista laboro, la penadoj estis kronataj de sukceso. El la malgranda grupeto fariĝis la hodiaŭ plej forta kaj plej vigla klubo en la lando, kies membroj gvidas ankaŭ la Jugoslavian Esperanto-Ligon, tiel direktante la Esperanto-movadon en la lando, kaj kies juna prezidanto, D-ro I. Lapenna, unu el la fondintoj de la Klubo, sidas en la supera 5-persona organo de la neŭtrala Esperantomovado por la tuta mondo. Do, granda sukceso, kiun nur maloftaj personoj atingis!

En la unuaj jaroj la Klubo ne havis multajn membrojn (30-40 gestudentojn), tamen la komitatanoj multe laboris en kaj ekster la Klubo. La Klubo jam en la komenco laboris multe laŭ internacia skalo, precipe inter la studentaro, kaj estis elektita dum la Universala Kongreso en Krakovo kiel centro de ĉiuj studentaj Esperanto-kluboj en la mondo.

Poste de jaro al jaro pligrandiĝis ne nur la nombro de la anaro, sed ankaŭ ĝia nivelo. Nesperozaj homoj forfalis, kaj restis nur seriozaj kaj agemaj homoj kiuj multe studis la lingvon kaj okupiĝis ankaŭ pri la aliaj sciencaj problemoj: oni studis lingvistikon, sociologion ktp. Dum ke en la unuaj jaroj iuj membroj ofte parolis malbonan Esperanton, kaj ofte intermiksitis kroatajn vortojn, nun aŭdiĝas nur la bonega kaj perfekta internacia lingvo.

La anaro plialtiĝis en la lastaj jaroj al 100 personoj, sed personoj kiuj fakte kunlaboras kaj ne estas nur anoj sur la papero. Tiajn ni povus havi je kelkaj centoj, ĉar ni ĉiujare forstrekas kelkdekono da anoj, kompreneble inter ili ankaŭ multajn, kiuj translokiĝis pro ricevo de posteno post finitaj studoj.

En la unuaj jaroj ordinaro laboris nur la komitatanoj, kiel okazas en preskaŭ ĉiuj societoj. Nun ĉiuj laboras, tiuj en la komitato kaj samtiel tiuj ekster la komitato. Kaj oni laboras laŭ plano kaj bona programo. Unu

zorgas por la klubaj aranĝoj, alia por la kursoj, tria por la kluba kaso, kvara por disvendado de « La Suda Stelo », kvina por « Heroldo », sesa por propagando en la nacilingvaj gazetoj, sepa por verkado de artikoloj, oka por IEL, ktp. Sekvas la laboro en la landa Ligo, por kiu kelkaj tre vigle kunlaboras, krome estas deĵorado en la ejoj, biblioteko, ktp. Ĉiulunde prelegas iu alia samideano pri interesa temo kultura, scienca, pri Esperanto ktp. Ĉiun unuan lundon en la monato estas « viva gazeto », kiun jam partoprenas eĉ niaj kursanoj post 4-monata lernado, kaj ili bonege uzas Esperanton.

La laboro en la landa Ligo estas tre vigla. Propagando de Esperanto estas metita sur seriozan kaj scienca bazon. Ni enpenetrigis Esperanton en multajn gazetojn.

La kursoj de AEK estas ĉiam vizitataj de 60-70 personoj (en la unuaj jaroj maksimume 25), la klub-aranĝoj de 60-80, kaj ekz. Zamenhof-vesperoj de 100 kaj pli multaj personoj. La Klubo eldonis la broŝuron « La lingvo internacia en la historio kaj hodiaŭ », de D-ro Lapenna, kies tuta kvanto de 2000 ekzempleroj rapide elĉerpiĝis. Pasintan jaron en aprilo aperis la lernolibro « Esperanto en dek lecionoj » de la sama aŭtoro, en 2000 ekzempleroj, kaj la tuta kvanto ĝis nun, do antaŭ la forpaso de unu jaro, jam elĉerpiĝis. Tiom granda intereso regas en nia lando por Esperanto. Nun la Klubo eldonas la duan eldonon en pli granda kvanto. Tiu sukceso estas komprenebla, ĉar la gramatiko estas tre bona, kompleta, kaj kostas nur 10 dinarojn. Krom tio la Klubo eldonis diversajn propagandajn postkartojn, poemojn, flugfoliojn ktp. La klubanoj faris multajn propagandajn prelegojn ĉe Zagreba radio-stacio, kiu bedaŭrinde ne estas aŭdebla en eksterlando, ĉar ĝi estas malforta; alie la internacia movado havus unu plian « Verdian Stacion ».

Jen estas nur en plej skizaj trajtoj raporto pri la modela laboro de AEK, kiu festos sian dekjaran jubileon la 27-an de februaro. Eventualajn salutojn kaj bondezirojn bonvolu adresi al: Akademia Esperantista Klubo, Primorska 2, Zagreb, Jugoslavio.

A. S. T., Zagreb.

Pri la facileco de Esperanto

Sajnas utile precizigi la ideojn pri tiu facileco, ĉar plej diversaj opinioj publikigitaj povas erarigi la propagandistojn kaj malfortigi ilian agon.

Kompare kun la naciaj lingvoj Esperanto estas pli facila pro motivoj pli malpli bone konataj de ĉiuj esperantistoj, kaj kiujn ni mallonge montros ĉi-sube :

1. Gramatiko entenanta **nur dek ses fundamentajn regulojn** ;
2. Tiuj reguloj estas **sen esceptoj** ;
3. La **karakterizaj finaĵoj estas vortoj**, kiuj troviĝas en la vortaro ; pro tio, aparta studo de la gramatiko preskaŭ ne necesas ;
4. **Formado de vortoj** per kuniĝo de **radikoj, afiksoj kaj finaĵoj**, laŭ simplaj kaj logikaj reguloj, kiuj ebligas faradon de sennombraj vortoj per malgranda nombro da elementoj ;
5. **Logika formo de la esprimoj** t.e. foresto de specialaj parolturnoj ; kune kun la supre montrita formado de la vortoj, tiu formo de la esprimoj ebligas komprenon de teksto per nur la vortaro, kaj laŭbezone faradon de esprimoj certe komprenataj, se ili estas logikaj ;
6. Forigo de ĉiuj malfacilaĵoj en la uzado de la **prepozicioj**, dank' al unu prepozicio de ĝenerala uzado ;
7. **Korelativaj vortoj** formataj per kuniĝo de malmultaj radikoj kaj finaĵoj facile memoreblaj ;
8. **Logiko de la konjugacio** kaj simetrio de ĝiaj finaĵoj ;
9. **Numerado** konforma al la skriba formo de la nombroj ;
10. **Prŭnncado** laŭ la ortografio, kaj akcento ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

Do se oni kalkulas tiujn motivojn de pli granda facileco, oni povas diri ke, **matematike, iu nacia lingvo, kiu posedas nenium el ili, estas dekoble pli malfacila ol Esperanto**, — ne aldonante la inter-

naciecon de la vortaro, kiun oni povas menciiri, se la varbotulo scias unu aŭ kelkajn el la plej disvastiĝintaj naciaj lingvoj.

Sed la facileco de Esperanto dependas ankaŭ urufianke **de la persono** kiu lernas ĝin, kaj aliflanke **de la maniero** laŭ kiu ĝi lernas ĝin.

Infanoj havas ĉefe aŭdan memoron, t.e. lernas per oreloj ; tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias legi, lernas tiamaniere sian gepatran lingvon ; pro tio la Cseh-metodo tute taŭgas por instrui la infanojn, kaj la neinstruitulojn, ĉar ili havas tute freŝan memoron, ekzercitan per iliaj tiamaj studoj ; la **junuloj** facile lernas la gramatikon. La **plenaĝuloj** havas ĉefe vidan memoron ; pro tio la klasikaj kursoj per temoj kaj tradukoj plej taŭgas por ilin instrui ; kaj la malpli granda vigleco de ilia studkapablo estas ofte kompenŝita per la kono de kelkaj fremdaj lingvoj, kies vortojn apenaŭ ŝanĝitajn ili retrovas en Esperanto ; ankaŭ ili pli ĝuste profitas la logikecon de la lingvo, pro la matureco de sia spirito formata dank' al iliaj aliaj studoj.

Laŭ alia vidpunkto, oni povas demandi : Kion oni nomas **plena scio de lingvo** ? Ĉiu persono posedas, laŭ sia profesio kaj vivkondiĉoj, pli malpli vastan, sed ne tutan konon de sia nacia lingvo, kaj tamen tiu limita kono tute sufiĉas por la ĉiutagaj rilatoj kun samlingvanoj. Estas facile akiri tian konon de Esperanto, ĉar, dank' al ĝia konstruo, ne tute ĝusta uzo de la lingvo ne kaŭzas miskomprenon (ekzemple instinkta aplikado de la principo de neceso kaj sufiĉo forigas kelkajn malfacilaĵojn enkondukitajn de tro severaj gramatikistoj). Kompreneble oni devas atenti, ke tiaj neĝustajtoj ne enkondukiĝu en la publikigitajn tekstojn ; feliĉe estas rimarkinde, ke nun tia danĝero ne ekzistas pro la pli kaj pli granda lerteco de la verkistoj, kaj dank' al la konscio

de la recenzistoj, kiuj kritikis en la gazetoj, kaj en la Akademia Sekcio de Kontrolo.

Mallonge la propagandistoj povas — ne « rakontante fabelon » — certigi, ke la lernado de Esperanto por la ĉiutagaj bezonoj estas almenaŭ dekoble pli facila ol tiu de iu eŭropa lingvo, — kaj, se necese, tion pruvi per la ĉi-supra listo; sed ke koŝto de la lingvo, necesa por verki publikigaĵojn aŭ literaturigaĵojn, postulas plian laboradon cetere nek malfacilan nek enuigan.

Tamen por pravigi tiujn dirojn estus utile, ke la metodo de lernado estu tiu, kiu taŭgas por la lernanto, kiel ni supre montris, kaj, pro tio, ke estu samtempe kursoj por la infanoj kaj neinstruituloj laŭ la Cseh-metodo, kaj aliaj per la gramatika metodo, — kaj, se eble, kursoj de perfektigado.

Cetere tiaj kursoj ekzistas en multaj grupoj; sed la gvidantoj devus zorge atenti pri tiu kiu taŭgas por ĉiu lernanto; ĉar netaŭgeco de la metodo estas certe unu el la kaŭzoj, pro kiuj tro multaj lernantoj forlasas kurson antaŭ ĝia fino, kaj sekve la movadon, kiu komence allogis ilin.

Rollet de l'Isle.

La Faktoj

Kompletige al la artikolo de s-ro Petit en « Heroldo de Esperanto » de 18.12.1938 kaj en la januara numero de « Esperanto Internacia », oni informis nin ke s-ro Védrine gvidas kurson ne en Villeurbanne, sed en la supera lernejo « Les Minimes » kiu estas en Lyon mem. En Lyon, ankaŭ s-ro Pialla gvidas kurson en la seminario por instruistoj, kun 31 partoprenantoj.

En Saint-Omer, en la liceo, kvar sekcioj sekvas la Esperanto-kursojn: unua grupo Sebert (klaso 3 kaj 4; 14 lernantoj); dua grupo Michaux (klaso 5; 21 lernantoj); tria grupo Bastien (klaso 6; 15 lernantoj). La unua kaj dua grupoj havas du kursojn ĉiusemajne; la tria grupo havas unu kurson. Tiujn kvin kursojn gvidas s-ro Gorier, subestro de la liceo. Kvara grupo Zamenhof sekvas perfektigan kurson de s-ro Deligny, kun 15 lernantoj. Do entute ses semajnaj kursoj kun 64 lernantoj.

Japana purisma movado kaj Esperanto

Purismaj movadoj en Eŭropo celas purigi la lingvojn de fremdaj influoj, precipe de la t.n. « fremdvortoj ». Purisma movado (« Kanamoji-Undoo ») en Japanujo celas purigi la japanan skribon de la ĉinaj ideografiaj signoj, kiuj en ĝi abundas.

Tiu ĉi movado eldonas gazeton sub la titolo « Katakana-Jidai » (Katakana-Epoko). Ĝia redaktoro tre favoras Esperanton kaj jam en kelkaj numeroj publikigis artikolojn de kelkaj japanaj esperantistoj pri nia movado, ekz. de s-roj Ito-Koiti kaj Baba-Yasomatu.

La purigo de la japana skribo estas tute necesa, ĉar ĝia malfacileco suferigas japanojn mem, pro la intermiksiĝo kun malfacilaj ĉinaj skribsignoj. Tiel okazas ankaŭ ke fremduloj, kvankam jam bone parolante la japanan lingvon, tamen tute ne kapablas skribi ĝin. La Kana-literoj estas legataj fonetike, kaj tial multe simpligas la skribadon de la japana lingvo kaj ĝian lernadon per fremduloj.

Estas ĝojiga fakto ke la purisma movado iras man-en-mane kun esperantistoj. Simile okazis ankaŭ en aliaj landoj.

Interesuloj pri « Kanamoji-Undoo », precipe japanoj mem, povas ricevi specimenon de la revuo « Katakana-Jidai », sendante respond-kuponon aŭ konforman japanan poŝtmarkon al la redakcio, ĉe: Kobe Katakana Centro, I-163 Kotono-tyo, Kobe, Japanujo.

Intereso pri Finnlando en Japanujo

Japana studento Masami Igarasi, kiu dum pli ol du jaroj studadis la finnan lingvon en Wakamatu-si, helpita de la Esperanto-societo de Uusikaupunki, komencis nun verki finnan japanan vortaron kaj gramatikon de finna lingvo por japanoj. Se aliaj eksterlandaj esperantistoj volas, ni aranĝos en Uusikaupunki kurson en finna lingvo per Esperanto. Interesuloj sin turnu al s-ro Hugo Salokannel, Uusikaupunki, Finnlando.

ĈEĤOSLOVAKAJ GESAMIDEANOJ FIDELE DAŬRIGAS

LA PORESPERANTAN LABORON

Ne estus mirige, se la ĉeĥoslovakaj gesamideanoj, pro la tragedio kiu trafis ilian respublikon, estus perdintaj la kuraĝon por daŭrigi la poresperantan laboron. Efektive, unu el ili skribis al ni antaŭ nelonge : « Nuntempe ni ĉeĥoj havas alian laboron por ripari ol fari interfratiĝan esperantan laboron, — se ni estis idealistoj, ni tro multe suferis pro tio. » — Des pli ni ĝojis, kiam antaŭ kelkaj semajnoj denove atingis nin la organo de l' ĉeĥoslovakaj esperantistoj, kaj nun ni ricevis tre mallongan sed kuraĝigan raporton el la oficejo de EAĈSR, Truhlářská 16, en Praha, kiu havas la jenan tekston :

Post la renverso en nia Respubliko ni perdis multe da anoj de nia asocio ; tamen la movado progresas. En multaj lokoj oni aranĝas kursojn por komencantoj, pri kiuj estas suliĉe granda intereso. Dank' al oferemo de niaj samideanoj, nia asocio povas daŭre ekzisti malgraŭ la malfeliĉaj okazintaĵoj lastatempaj. Denove ni atentigas, ke en la asocia oficejo ni ĉiutage deĵoras, kaj ĉiuj gesamideanoj estas invitataj viziti nin. Ĉiumarde okazas amikaj vesperoj en la sama ejo post la 20-a horo.

BONE KONATA ANGLA SAMIDEANO EKLOGAS EN ARGENTINO

La 20-an de januaro s-ro Wilfred M. Goodes el Romford, Anglujo, vojaĝis kun sia sveda edzino al Rosario, Argentino. Li tie prenos altan oficon kiel ĉefinstruisto de angla lernejo. Dum la pasintaj ok jaroj s-ro Goodes vigle laboris por nia movado, precipe por la enkonduko de Esperanto en la lernejoj, kaj kiel sekretario de la grupo Romford. Dum ok jaroj li instruis nian lingvon al multaj klasoj en sia lernejo en Romford, kaj certe liaj entuziasmo kaj sperto baldaŭ vidiĝos en lia nova lando. La samideanoj de Rosario trovos lin bonega laboranto por nia movado. (E. W. A.)

INTERESO POR ESPERANTO KRESKAS EĈ EN LA PLEJ ALTA NORDO

En Vardó (Norvegujo), ĉe la Norda Glacia Maro, lastan aŭtunon s-ro O. T. Nicolaisen komencis gvidi du kursojn kun 63 partoprenantoj ; inter ili estis 5 instruistoj kaj 18 infanoj. Post la kurso fondiĝis Esperanto-klubo, al kiu preskaŭ ĉiuj kursanoj aliĝis. Tio estas grava venko en la lando de la Noktomeza Suno. La klubo estas la sola esperantista societo en la provinco Finnmark, kies areo estas pli granda ol ekz. Danujo aŭ Nederlando. — Nun s-ro N. gvidas kursojn en la turist-urbo Narvik.

S-ano J. Vávrovsky - 60 jara

En malgranda urbeto en suda Bohemio (Ĉeĥoslovakio), Dolni Bukovsko, naskiĝis la 10-an de februaro 1879 nia amata samideano Josef Vávrovsky, pensiita ĝendarmo kaj delegito de Internacia Polica Ligo en Praha.

Antaŭ 30 jaroj li okupis sin pri la studado de nia lingvo en malgranda loko en Aŭstrujo, kiel juna ĝendarmo. Poste li translokiĝis al la urbeto Český Brod (Bohemio), de kie li komencis interrilati kun la samideanoj organizitaj. De tiu tempo, pli kaj pli energie kaj praktike li aliĝis al la verda familio.

Dum liaj aktivaj deĵorjaroj, ni renkontadis lin ofte ĉe la universalaj kongresoj kaj ĉe esperantaj konferencoj, kiujn li partoprenis je siaj propraj elspezoj, kvankam li okupiĝis ne nur pri niaj esperantaj aferoj, sed, pere de Esperanto, interesiĝis pri sia faka okupo : kriminalistiko. En de li verkita kaj eldonita libro « Profesiaj krimuloj » li parolas pri la utileco de nia lingvo kaj montras, kiamaniere dum la universalaj kongresoj de Esperanto li uzis okazajn por studi kriminalistikon en grandaj urboj de Eŭropo. Vizitantoj de la universalaj kongresoj konas lin bone, kiam li iradis en nacia kostumo de Ĥodoj kaj ĉiuokaze li paroladis kun ĝendarmoj kaj policanoj pri la utileco de Esperanto por la sekureca servo kaj lasis sin informi pri la novaĵoj en tiu aŭ alia lando. Reveninte hejmen, li uzis ricevitaĵojn novaĵojn por la plibonigo de la spertoj en sia tako.

Kvankam li scias (parole kaj skribe) kelkajn lingvojn, li mem ĉe kaj ĉiam rekomendas Esperanton kiel la plej taŭgan kaj facilan ilon por la interkompreno de la homaro en la 20-a jarcento.

Ĉiuj, kiuj vizitis Praha'n, certe konas nian jubileonton. Lia klopodo estis, ke en la ĝendarmerio en Praha, dum la kursoj, oni instruadu ankaŭ Esperanton, kaj li mem havis la eblecon, gvidi kursojn en nia lingvo.

Ni ĉiuj, kiuj apartenas al la granda Zamenhofa familio, deziras al nia jubileulo sanon, feliĉon kaj longan vivon, por ke li povu ankoraŭ esti pli utila al la homaro !

ESPERANTO EN RADIO

Bedaŭrinde ni devis rezigni publikigon de la Radio-paĝo en la nuna numero, ĉar ni ne ricevis ĝustatempe la informojn. Pri la regula j dissendo relegu en la januara numero. Aŭskultu precipe la teatraĵojn ĉiulunde en Parizo, kaj poste danku la stacion !

NI RECENZAS

Olive Schreiner : Undino. Tradukis Stephen A. Andrew. — 283 p. 13×19 cm. Eldonis The Esperanto Publishing Company, Rickmansworth, Anglujo. Mendebla por gld. 1.95 (inkl. sendkostoj) ĉe la Libroservo de « Heroldo de Esperanto », Scheveningen, Nederlando.

Golgoto... vera Gulgoto de virino kiu devis de la plej junaj jaroj iri dornan vojon plenan de moko, prijuĝo, indiferenteco kaj neamo de ĉirkaŭanta ŝin medio, kiun ŝi superkreskis en ĉiuj siaj kompreno kaj vidpunktoj, virino kiu sentis la vivon ne suprajne kiel la homoj ŝin ĉirkaŭantaj, sed profunde, tiel profunde ke ŝia vivo fariĝis konstanta turmentado kaj memanalizo...

Ŝi renkontas ĉomon, kiun ŝi ekamas per sia tuta animo, ŝi ekamas lin tiel, ke ŝi estas preta eĉ oferi sian propran pensmanieron kaj fariĝi banala, ordinara virino, zorganta nur por sia eksterajo kaj servanta nur kiel bela aldonajo kaj elmontrilo por la viro. Sed li forlasas ŝin, kaj ŝi surpaŝas la vojon de doloro kaj sinifero, kiu aldondukas ŝin al morto, kiam ŝi ekscias ke la viro, kiun ŝi amegis, mortis.

Jen estas mallonge la enhavo de la romano. Ĝi estas por nuna tempo de emancipita virino iom malnovmoda, kaj multaj, precipe nunaj virinoj de juna generacio, eble kun iom da malŝata rideto rigardos Undinon, tiun antaŭbatalintinon por ilia sendependa kaj egalrajta stato kiun ili nun ĝuas. Sed la mondo ĉiam restas la sama kia ĝi estis en la tempo de Undino, mondo de malindulga prijuĝo kaj malŝato por la aliaj.

De-S.

★

Ročenka Československého Rozhlasu 1938. (Jarlibro de la Ĉeĥoslovaka Radio 1938.) Eleganta, ampleksa volumo, bonege presita, moderne aranĝita, kun ĉ. 135 ilustraĵoj, tabeloj ktp. La libro estas verkita en la ĉeĥa lingvo, kun resumoj en germana, franca kaj angla. Ĝi estas detala raporto pri la agado de Ĉeĥoslovaka Radio, precipe de la stacio Praha, dum la tempo de komenco de 1937 ĝis mezo de majo 1938. La Esperanto-dissendoj el Brno estas traktitaj en speciala ĉapitro, kiu estas verkita en la lingvoj ĉeĥa kaj Esperanto; sed ankaŭ pri la Esperanto-dissendoj troviĝas resumetoj en la germana, franca kaj angla. En la jarlibro estas ankaŭ bona bildo pri la Esperanto-dissendo de la opero « La kiso » de Smetana, kiu vekis tiel entuziasman eĥon ĉe la tutmonda esperantistaro.

D-ro F. Erdey : Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno en Budapeŝto, 1938. — 160 p., 16×24 cm. Eldono de la Konstanta Komitato Esperanta por la Eŭkaristiaj Mondkunvenoj, VIII, Mária-str. 23, I., Budapeŝto, Hungarujo. Prezo 4 pengoj (10 respondekuponoj).

Fine jen oni povas legi detalan raporton kaj dokumentaron pri tiu gravega aranĝo, kia estis por la tuta Esperanto-movado la Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno. La aranĝintoj ion plendas pri nefieriga sukceso: estis dissenditaj 20.000 broŝuroj kaj 2.200 afiŝoj, kaj rezulte alvenis « nur » 500 leteroj kaj 30 eksterlandaj partoprenantoj. Sed mi opinias ke, konsiderante la cirkonstancojn, pri tiu komenca sukceso oni povas esti tute kontenta.

Ne estas eble, preparoli aŭ eĉ nur citi la tutan enhavon de la broŝuro. Ĝi prezentas riĉegan materialon, kaj kiel libro vere dokumenta ĝi prenas sian lokon inter la plej gravaj historiaj dokumentaroj de la historio mondlingva. Mi ne forgesu la multajn ilustraĵojn, dissemnitajn inter la paĝoj de la libro, kaj presitajn sur kreta papero. D-ro Erdey, kompilante tiun libron, faris bonan laboron. Ĉiu katolika esperantisto devus posedi tiun ĉi gravan dokumentaron.

M.

★

L'Esperanto dans la vie moderne, kaj : **30th Universal Esperanto Congress**, estas la titoloj de du resumraportoj 4-paĝaj, anglalingvaj, la unua pri la Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo », la dua pri la 30-a Universala Kongreso en Londono. Ĉi tiuj resumraportoj estas bonege uzeblaj kiel propagandiloj. Ili estu disdonataj grandkvante al intencantaj personoj varbotaj por nia afero, ankaŭ al oficialaj instancoj, gravaj komercaj firmoj ktp. — Eldonis : BEA, 142, High Holborn, London W.C. 1.

★

Nagoja. La Urba Oficejo de la tria urbo de Japanujo, laŭ loĝantaro (1.200.000 loĝantoj), eldonis okaze de la 27-a Japana Esperanto-Kongreso belan 8-paĝan faldprospekton ilustritan, en nia lingvo. Interesuloj petu ĝin de : Turisma Sekcio, Nagoja, Sijakuŝo, Nagoja, Japanujo. (Aldonu respondekuponon!)

★

Vivasekura Asocio, fondita en 1863 de Nederlanda Instruista Societo, Prinsengracht 963, Amsterdam C., Nederlando, eldonis 4-paĝan bone presitan (en nigra kaj verda koloroj) prospekton en Esperanto. Interesuloj petu ĝin de la supre citita adreso.

estis la unua kiu en 1816 sukcesis reprodukti transparentajn desegnojn sur plakoj tegitaj per lumimpresema verniso; li nomis tion « heliografio ». Poste li konatiĝis kun Daguerre, kiu plibonigis lian eltrovon tiugrade, ke oni povis ekspluati ĝin praktike.

Sed eble nek Nièpce, nek Daguerre, iam revis, kiel grandiozan evoluon iam prenos ilia invento. Ni pensu pri la ilustrado de la gazetaro, pri la filmo ktp.

La kvanto da akvo sur la Tero.

Ni sciigis en la lernejo, ke la akvo kovras proksimume du trionojn kaj la tero proksimume unu trionon de nia planedo. Sed kiel en realeco rilatas la kvanto de la akvo al la kvanto de la firma konsistaĵo de nia Tero? La scienco elkalkulis ke la tuta akvoprovizo troviĝanta sur nia planedo estas nur unu 830-ono de la volumeno de la Tero. La volumeno de nia Tero nome estas 1.083.205 milionoj da kubikaj kilometroj, kaj la akvo laŭtakse ampleksas nur 1304 milionojn da kubikaj kilometroj, el kiuj 1300 milionoj troviĝas en la oceanoj.

« Nobel »-eco.

Por la jaro 1938, la Nobel-premio por paclaboro estas donita al la Nansen-Kontoro. Okaze de la transdono de la premio atentigis la prezidanto de la Nansen-organizaĵo, la norvega jursciencisto Hansson, pri la graveco de la verko de la Nansen-Kontoro por politikaj rifuĝintoj: la Kontoro nome pritraktis jam 800.000 kazojn de rifuĝintoj. Li diris, ke la problemo de rifuĝintoj estas solvebla nur per aktiva kooperado inter la registaroj kaj la Ligo de Nacioj. Verŝajne oni bezonos por tio prunto. Sed prunto ne sufiĉas. « Estas necese (diris Hansson) forigi la murojn inter la landoj, ĉar tiuj muroj detruis jam tre multajn materiajn kaj spiritajn valorojn. »

La Nobel-premion por naturscienco, kiel estas sciante, ricevis itala-juda Prof. Fermi, kaj por literaturo la usona verkistino Pearl Buck.

Kvin milionurboj en Usono

Laŭ la lasta denombro, Usono havis preskaŭ 130 milionojn da loĝantoj. El ili vivis preskaŭ unu dekono, nome 12 milionoj, en Novjorko kaj ties antaŭurboj. (La distrikto de la urbo Novjorko: New York City, havis ĉ. 7,5 milionojn da loĝantoj.) La dua urbo en Usono estas Chicago kun 3,6 milionoj da loĝantoj; sekvas Philadelphia kun 2,4 milionoj, Detroit kun 1,8 kaj Los Angeles kun 1,5 milionoj. Notinde estas, ke antaŭ 20 jaroj Los Angeles havis nur iom pli ol 500.000 loĝantojn. Cleveland, kiu en la pasinta jaro gastigis la kongreson de la nord-amerikaj esperantistoj (la 31-an Kongreson de EANA), post nelonge atingos la milionon, aŭ jam atingis ĝin; okaze de la lasta denombro mankis je tio ankoraŭ 60.000 loĝantoj.

Nia afero

Ne estas direble, ke nia afero troviĝas en brila stato. Tamen konstatiĝas lastatempe ia trankvila sed firma fido. Niaj pioniroj ne povas nun « ŝtormi la ĉielon ». La cirkonstancoj devigas ilin resti en modestaj hmoj. Ili do laboras pli kviete, sed persiste, certaj pri la nepra venko.

Nia internacia Ligo finis la 1938-an jaron en pli favora stato ol la antaŭan jaron. La defcito estas konsiderinde malpli alta. Laŭ la membrostato, estis en 1938, pro la perdoj en Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio, 807 asociaj membroj malpli, sed aliĝis 360 individuaj membroj pli, ol en 1937, kaj de la financa vidpunkto la 360 pliaj individuaj membroj estas pli gravaj ol la 807 malpliaj asociaj membroj. En 1939, IEL kredas eviti deficiton. Ni « tenu por ĝi la dikfingron », varbu novajn membrojn kaj vendu kuponlibretojn por helpi al forigo de la hipoteko.

Zigzago.

Korekto : En mia lasta « promonado » eniĝis grava eraro : la paĝigisto intermiksitis la liniojn en la ĉapitro « Naĝarto por vivsavo kaj unua helpo ». Pĉst la 5-a linio devas sekvi linioj 11-13, poste linioj 6-10, kaj fine linioj 14-17.

LORD DAVIES :

LA NOVA KOMUNUMO

(Verkita origine por The British Esperantist)

La okazaĵoj de la lastaj kelkaj monatoj certe konvinkis nin ĉiujn pri tio, ke necesegas radikala ŝanĝo en la sfero de internaciaj rilatoj, se ni volas eviti militon. Nunmomente la perforto anarkia diktas la destinon de la nacioj. Ĝuste tiu fakto kuŝas ĉe la fundo de plejmulto el niaj nunaj malfacilaĵoj. La sola ĵusta, aŭ laŭmorala, motivo apliki perforton estas la polica funkciado, ĉar tiam ĝi uzigaŝ sen malutilo por servi justecon kaj por certigi respekton kaj subtenon al la leĝaro. Jen unu el la fundamentaj doktrinoj de la « Nova Komunumo » (angle « New Commonwealth »). La « Nova Komunumo » estas libervola, internacia asocio konsistanta el anoj en 51 diversaj landoj, kiu pledas por la starigo de du institucioj — Justeca Tribunalo aŭ Komisiono, kaj Internacia Policistaro — kiel parto de la konstanta funkciilo de la Ligo de Nacioj. Ĝia programo estas kreema kaj pozitiva, ĉar ĝi celas esprimi la universalajn sed iom malklarajn aspirojn al la paco kiujn ni ĉiuj tenas en kore, sub formo ne nur de traktatoj kaj interkonsentoj, sed de vivantaj kaj praktikaj institucioj.

Kial emfazi la neceson pri institucioj? Estas evidente ke maŝino ne povas funkcii sen motorforto, kaj, inverse, ke la motorforto perdiĝos sen maŝino. Same, la Ligo povas funkcii nur tiam, kiam ĝiaj membroj inspirigaŝ de refleksiĝa volo fari justecon, de kiu dependas la paco. Ni scias ke ekzistas disputoj kaj plendadoj, sed se ne estas efika Liga Parlamento, eĉ ne Justeca Tribunalo, la volo atingi reciprokan pacaranĝon vaniĝos.

Ni scias ke okazas rabegoj kaj neincititaj atakoj; sed se ne estas taŭge organizita sankcissistemo, la volo certigi justecon neniam realiĝos.

Jen do la neceso pri la konvenaj internaciaj institucioj, per kiuj povas sin esprimi la publika opinio. Tio estas la vojo de la « Nova Komunumo » al la paco.

Ne utilas diskutado pri la forigo de la militkaŭzoj, se ni ne provizas la funkcilojn por ia administrado de la justeco. Neniu civilizita registaro povus daŭre funkcii sen institucioj kapablaj efektiviĝi ŝanĝojn en ties leĝoj kaj ilin subteni. Kiel do ni povus atendi ke la Ligo inaŭguru la regadon de la justeco, se ĝiaj membroj rifuzas doni al ĝi similajn instituciojn? Plejmultaj el ni jam tedigaŝ de nuraj denuncioj pri milito. Kion ni efektive volas scii, tio estas: kiel ĉesigi militojn?

La respondo de la « Nova Komunumo » estas: per starigo de la internacia ordo kaj justeco sur la samajn principojn kaj per la samaj metodoj, kiujn oni sukcesaŝ aplikis dum la evoluo de ĉiu civilizita komunumo.

Oni devos fortigi la Ligon per du manieroj. Unue, per provizo de laŭpaca proceduro por la reguligo de ĉiuj disputoj — arbitraciado anstataŭ milito. Due, per evoluo de sistemo de internaciaj sankcioj — diplomaciaj, financaj, ekonomiaj kaj militistaj — sufiĉe fortaj por deteni ĉiun nacion, kiom ajn potencean, de atakoj al ĝiaj najbaroj. Tiuj reformoj estas sinkompletigaj kaj devus efektiviĝi samtempe. Oni ne povas ilin apartigi, ĉar estas konate ke juĝisto nepre bezonas polieston, kaj ke poliesto ne povas utili sen juĝisto.

Ni rigardu de pli proksime la du instituciojn kiujn mi menciis. Unue, la Justecan Tribunalon, aŭ Komisionon. Ĝia tasko estus decidi pri ĉiuj disputoj, kiujn la Konsilantaro de la Ligo vane provis solvi. La devo de la Konsilantaro ne estas arbitracii sed intertrakti kaj interpacigi. Se ĝiaj klopodoj finiĝos per dilemo, tiam laŭ la sistemo de la « Nova Komunumo » la disputo pluirus aŭtomate antaŭ la Justecan Tribunalon. Jen kio efektive okazis ĉe la manĉuria demando, kiam la Komisiono Lytton elektigaŝ per raporti

pri la malkonsentaĵoj de Ĉinujo kaj Japanujo.

Simile al la Komisiono Lytton, la Konstanta Justeca Tribunalo de la « Nova Komunumo » konsistus, ne el registaraj reprezentantoj, sed el individuoj senpartiaj kaj nemotivitaj, elektitaj de la Konsilantaro kaj Deputitaro pro sia vasta sperto kaj fidindeco. Ili estus pretaj sin apartigi plene de la politiko de siaj respektivaj landoj.

La anoj de tiu ĉi komisiono ŝarĝiĝus de la respondeco esplori ĉiujn faktojn kaj aŭdi ĉiujn atestojn. Ili poste rekomendus al la Deputitaro tion, kio laŭ ilia opinio estas racia, justa kaj senpartia solvo de la disputo.

Nun mi venas al la dua celo de la « Nova Komunumo » — la organizo de sistemo de diplomaciaj, financaj, ekonomiaj kaj militiraj sankcioj, menciitaj en Artikolo 16 de la Ĝenerala Interkonsento, laŭ maniero taŭga por certigi rapidan, efikan kaj universalan kunagadon kontraŭ la atakanto aŭ neplenumanto.

Tio signifas la anstataŭadon de konkurencaj per kooperativaj armiloj — la komunigon age de ĉiuj membroj de la Ligo de siaj financaj, ekonomiaj kaj armeaj rimedoj, por kontraŭstarigi al la atakanto premege superecon de perforto.

Tia sistemo necesigas konsekvence la formadon de polica armeo sub la gvidado de la internacia aŭtoritato. Unuigo estas forto, kaj tia unuigita armeo iom post iom altirus al si la lojalecon de la popoloj kiujn ĝi protektas, samkiel la policistaroj de nia propra lando estas nun rigardataj kiel la protektantoj de la komunumo.

Cu tio estas praktika propono? Por venki en la lasta milito, la aliancoj trovis sin devigataj komunigi siajn rimedojn kaj eĉ establi unuigitan komandon super siaj armeoj. Simile, por malebligi eventualan militon, ni devas nun kunlabori kun aliaj membroj de la Ligo organizante niajn komunajn rimedojn kaj kreante internacian policistaron. Estas vane diri ke teknikaj malfacilaĵoj baras la vojon.

Verdire, ili ja ekzistas, sed ili neniel estas nesupereblaj, kiel ŝajnas kredi

multaj el niaj kritikantoj. Konsideru ekzemple la lingvan demandon en rilato al internacia policistaro. Antaŭ iom malpli ol dek jaroj mi skribis, en la libro « La Problemo de la Dudeka Jarcento »:

« Eĉ la lingva malfacilaĵo povas esti forigata kaj la Turo de Babel detruata. La rekrutoj de la internacia policistaro estos ĉiuj junuloj. Se necese, la akirado de pluraj lingvoj prezentos al ili nur malmulte da malfacilo, aŭ troviĝos eble simpla solvo en la enkonduko de internacia komunikilo. Esperanto, ekzemple, estas lernebla en malpli ol ses semajnoj. » Jam de pest tiam, kiam mi skribis tiujn vortojn, Esperanto faris grandajn antaŭenpaŝojn, kaj mi vidas nenion kontraŭ tio, ke ĝi fariĝu la lingvo de internacia polico kaj uziĝu por la kunsidoj de internacia tribunalo.

Mi kredas ke la sola espero pri daŭra paco kuŝas en la baldaŭa starigo de mondtribunalo por la laŭpaca reguligo de ĉiuj disputoj kaj de internacia policistaro por subteni la ordon kaj justecon. Al ambaŭ tiuj institucioj estas necesa internacie komprenebla lingvo, kaj kiam venos la tempo por ilia starigo, la pretendoj de Esperanto certe devos ricevi konsideron kaj estos malfacile rejetebaj. Pro tiu kialo, aparte de ĉiu alia, la « Nova Komunumo » meritas la subtenon de la esperantistoj, kaj mi volus alvoki al ili, ne nur en Granda Britujo sed ankaŭ en aliaj landoj, kunagi kun ni en nia luktado por pli sanaj internaciaj rilatoj kaj por nova mondsistemo bazita sur justeco kaj egaleco.

Tradukis: Mark DU MERTON

★

Interesuloj povas skribi al: La Sekretario, La Nova Komunumo Societo, Thorney House, Smith Square, London S. W.

Lord Davies estis dum ĉirkaŭ dudek jaroj parlamentano, reprezentante parton de Kimrujo kiel liberalulo. Li estas konata kiel aktiva laboranto por pacaj celoj kaj ankaŭ kiel verkisto pri tiuspecaj temoj. Krome, li estas industriisto kaj direktoro de grava fervojkompanio kaj de Midland Bank Ltd.

Lia artikolo povas esti represota en traduko parte aŭ entute, — en tiu okazo estus bone sendi ekzempleron al la Societo.

Nova konstrumaniero en Berno

LA URBO DE LA 31-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Dum pasintaj jaroj oni tre multe konstruis en la federala urbo. La nombro de konstruitaj loĝdomoj estis en 1933 rekorda. diversaj kvartaloj kaj kolonioj multvalore vigligis kaj riĉigis la urbon. Pli nombraj estas ankaŭ la *publikaj konstruaĵoj*, kiuj, preskaŭ ĉie, konformiĝis al la novaj, vivaj konstruformoj nuntempaj. Same kiel la malnova urbo, kiu prezentiĝas unu el la plej famaj urboj en Eŭropo, kaj kiu pro la nepra unueco kaj bonstila beleco de siaj konstruaĵoj eĉ ĝuas oficialan egidon rilate al ĉiuj problemoj pri novkonstruado, tiel la kvartaloj ĉirkaŭ la urbo fariĝu vivaj atestantoj de moderna kreo kaj formado. La aplikado de modernaj, raciaj konstrumetodoj kaj formoj rezultis aŭtomate el la respektita praktika celo kaj interna organizo de la grandaj konstruaĵoj. Plezure oni povas konstati, ke tiuj ĉi monumentaj konstruaĵoj ne efikas per pompaj fasadoj, sed tamen reprezentas en moderna senco siajn grandecon kaj gravecon kaj simbolas ankaŭ arkitekture, en maniero komprenebla kaj konvinka, siajn celon kaj internan strukturon.

La « *Lory* »-hospitalo, konstruita de la arkitektoj Salvisberg kaj Brechbühl kaj inaŭgurita en 1928, estas la unua publika konstruaĵo laŭ moderna konstrumaniero.

Tute modernaj prezentiĝas sur la Mulden-strato kvin institutoj de la Universitato, konstruitaj de s-roj Salvisberg kaj Brechbühl kiel uniforma, longetendita domaro finita en 1931. Kolosa, longa domo kun 111 fenestroaksoj estas dividita per enirejoj de la institutoj kaj per grandaj, elstaraj aŭskultejoj en la plej supra etaĝo. Sanflanke estas kvin transversaj domaroj, enkadrigitaj de ĝardenoj; en ili troviĝas la laborejoj de la kvin institutoj, t. e. la laboratorio de la kantona kemiisto, la farmacia, zoologia kaj geologie-mineralogia

institutoj, kaj en la lasta, alt'gita flankdomo la medicina instituto. Pro teknikaj bezonoj oni uzis por la tuta konstruaĵo, kiu malgraŭ sia grandeco tute ne efektas giganta sed tre trankvila kaj kompleta, ebenan tegmenton.

En la centro, apud la tre frekventata Laŭpen-strato, la *Suva-domo*, finkonstruita en 1932 de la arkitektoj jam menciitaj, ankaŭ estas io moderna. La sesetaĝa konstruaĵo, en kiu ĉefe troviĝas la oficejoj de la svisa akcident-asekura instituto, estas aranĝita kvaronarke kiel la fasado de grandega ronda areno; tiamaniere ĝi tre oportune reguligis la cirkuladon en la angulo de la Laŭpen- kaj Seiler-stratoj

La *Kirchenfeld-kvartalo* transformiĝis en grandurba kvartalo de muzeoj kaj bibliotekoj. Sur la tereno inter la historia muzeo kaj la nova gimnazio, konstruita en 1927 de la arkitektoj Widmer kaj Daxelhofer, jam staras du monumentaj konstruaĵoj. La *svisa nacia biblioteko*, en sia tuta aranĝo moderna farajo de la arkitektoj Oechger, Kaufmann kaj Hostettler, estis inaŭgurita en 1931. La meza parto, en kiu troviĝas la libromagazenoj, estas alta ok etaĝojn, en alia estas legoĉambroj kaj ekspoziciejoj kun desupra lumo. Multaj federalaj oficoj estas lokitaj en la flankajoj. — En 1934 la arkitektoj Krebs kaj Müller konstruis apud tiu grandega komplekso la *naturhistorian muzeon* kun belaj florbedoj. En la triparta muzeo troviĝas ĉambrego por grandaj mambestoj, kaj sube estas paroladejo. — Apud la *Helvetia-placo*, kontraŭ la arthalo, estis finkonstruita, en la sama jaro, de la arkitektoj Kläusen kaj Streit, longe etendita domo, en kies antaŭa parto estas lokita la « *Schulwarte* » kun ĉambregoj por paroladoj kaj ekspozitaĵoj, apude la *svisa alpa muzeo* kaj *poŝta muzeo*.

Tradukis *Jules Perlet*, Bern.



Montgrimpado en la Berna Supralando

ne malproksime de la urbo kiu gastigos en la venonta somero nian
31-an Universalan Kongreson.

POLDI SCHMIDL :

Konduktreguloj por skikurantoj

Tuj kiam la skikuranto formetis la ŝelkonojn, por fiksteni per zornimeno siajn sportpantolonon sur vere rimarkebla ventro, tuj kiam li interŝanĝis la amelitan tolkolomon per la varma, multe pli praktika koltuko, ekde tiu momento li fariĝis alia homo. Maldelikata, malafabla kaj pleba. Tiu ĉi interna ŝanĝiĝo devigas lin, kondukti laŭ tio ankaŭ ekstere. Jam dum la vojo al la stacio, indiferente ĉu piede aŭ elektrotrame, li pretendu por si ne pli malmulte da spaco ol tiun cirkolon, kiun li faras tute neatendite per siaj skioj kaj skibastonoj, kaj ties firmecon li eltrovu sur la kranioj kaj ripoj de la nesuspektaj kunhomoj. Por la skikurantoj kun propra aŭtomobilo estas pli penige ankaŭ en aliaj rilatoj. Al ili estas maleble forĵeti envolv-paperojn, kotlet-ostojn kaj cigar-restaĵojn sur la plankon en la kupeo de la sporttrajno, ĵeti sardenujojn kaj malplenajn konjakbotelojn kontraŭ la telegrafmastojn kaj fervojgardistojn. Ili ankaŭ havas pli malmulte da spaco je dispono ol la uzantoj de la sporttraĵoj por grasmiri jam dum la forveturo siajn vizaĝojn per vazelino. Sporttraĵoj estas, kiel oni scias, ĉiam tre malmulte okupataj, oni povas en ili tiel kondukti, kvazaŭ oni estus hejme.

En la montgastejo, sed speciale en la montrifuĝejoj, precipe valoras la leĝoj de la civilizo. Rifuĝbudoj havas malofte dommastron, kiun oni povas sonorile veki nokte por la prezaĉo de unu groŝo. Oni do malignoru la profundan, bonmeritan dormon de la en ĝi tranoktantaj sportkolegoj kaj uzu kiel velikon pugnoj kaj najlitaj: ŝuojn, per kiuj oni malforte frapas la pordon. Tiam oni postulas ĝentile sed ordone varman noktmanĝon. En okazo, ke la budgastoj nun plu ne povas trovi bonan dormon, oni ĝojigu la lacajn kunloĝantojn per la rakontado de « longbarabaj » anekdotoj, ĉe kiuj oni ĝentile prisilentu la poentojn, kaj poste oni dediĉu sin al forta ronkado por eviti la dankon de la aŭskultintoj.

Nekonsilinde estas, prisilenti al ĉiu, kiu ne volas aŭdi ĝin, ke oni estas ski-

glorulo. Eĉ tiam, kiam oni estas klubmajstro, oni ne konfidu, ke estas keĝloklubo, kiu estas honorata, ke oni en ĝi reprezentas tiun ĉi indecon.

Sur ekzercejo estas preskaŭ ĉiam renkontebla brunigita, junaĝa viro, kiu penas en la ŝvito de l'frunto de siaj lernantoj, enkapigi al ili la sekretojn de la skiveturado. Al tiu ĉi viro, kiu malgraŭ sia juneco atingis jam pli ol kelkajn rekordojn de « Slalom », de «No fall races» kaj de aliaj skikurspecoj, la per siaj novaj skioj ekipita « Skigolo » helpeme kunhelpu. Ankaŭ nedemandite li donu al li konsilojn, bonvole sed energie montru al la novaj, inaj skisuĉuloj, kiel ili ne faradu, kaj memorigu ĉiam je tio, ke la skiinstruisto ne venis el la ĉielo, kvankam li estas titolata « majstro ».

En la soleco de la naturo la homo bezonas iomete da instigo. Tial oni rakontu senĝene pri siaj danĝeraj ekskursoj, de kiuj oni bedaŭrinde restis la sola postvivulo, por doni al la aŭskultantoj imagon pri la propra sporta grandeco. Nur dum suprenirado oni fervoru frapantan retenemon. Oni ne transprenu la gvidadon de la ekskurso, sed restu malantaŭe kaj uzu la antaŭirantojn nur kiel neĝpluĝilon.

Ankaŭ post la alveno en la budo oni prenu por si maksimume duoble tiom da dormkovriloj, kiom estas destinitaj por ĉiu partoprenanto, kaj lasu la mezetaĝajn litojn al la pli maljunaj partoprenantoj. Okaze, ke iu partoprenanto falegus dum la valenveturo, eĉ elartikiĝus al li piedo, tiam oni ne enmiksi sin en tiun ĉi privataferon de fremdega homo, sed veturu valen por atendi ĉe kafeo kaj kuko la aliajn.

Sian ekipon kompletigas la bonedukita skiveturanto per kiom eble plej diskreta interŝanĝo de fremdaj skibastonoj.

Skisporto estas hodiaŭtempe populara sporto, sanigputo por ĉiuj. Se oni estas devigata pro manko de dormostaj montrimedoj loĝi en hotelo « Majestic » aŭ en hotelo « Angleterre », anstataŭ en nobla vilaĝa gastejo, tiam oni konfesu tion mal-

Stratosfero kaj Batisfero

En la dua jaro de la mondmilito oni faris ĉe Krupp provojn per la « Ueber-Bertha », kanonego kies tubo estis 17 metrojn longa. Post la unuaj pafoj, oni vane serĉis la splitojn interne de radio de ĉirkaŭ 30 kilometroj, laŭ la kalkulita ĵetdistanco de la nova pafilego. Oni devis plivastigi la esplorojn pli ol cent kilometrojn de la pafloko por fine trovi la postsignojn de la pafita obuso.

Kiel tio okazis? La enigmosolvo montrigis tre simpla. La obuso, pafita kompreneble laŭ tre dekliva angulo, preteriris la teratmosferon kaj penetris en la stratosferon; ĉar en tiu regiono ekzistas neniu vertikala aerfluo, la frotezisto estas reduktita ĝis unu kvarono. Tiel la obuso perdis kvarfoje malpli da rapideco ol interne de la aertavolo kiu senpere ĉirkaŭas nian teron, kaj atingis celon proksimume kvarfoje pli malproksiman.

Nuntempe, en Ameriko oni faras balistikajn provojn kies konkludoj estas ke la rapideco de korpoj ĵetitaj kun granda komencrapido en la stratosferon kvin- ĝis dekofoje multobliĝas.

Se oni nur restas je la malalta limo de tiuj ciferoj, oni povas kalkuli ke aviadilo, konstruita laŭ la rimedoj de la hodiaŭa tekniko, en la stratosfero povus atingi la mirindan rapidecon de po 3000 kilometroj hore.

Same, per aliaj vortoj, estas nenia utopio supozti ke niaj nepoj (eble ankaŭ baldaŭ niaj filoj) veturos dum ses horoj de Parizo al Tokio, dum apenaŭ unu horo al Romo, kaj dum malpli ol 10 minutoj al Londono.

Tiuj aviadiloj kompreneble havos spe-

kaŝe sur la ekzercejo aŭ ankaŭ alie. Ĉar en la libera dia naturo, en la neĝfreŝa arbegaro malvaloras ĉiuj rangdiferencoj, kaj kio diferencigas la « skiulinjojn » de la monduma sinjorino, tio nur estas la lakitaj ungoj kaj koloritaj lipoj. La bonedukita skisportisto tial flirtas plej bone same kun tiu ĉi, kiel kun tiu sportkolegino, eĉ se ŝi tute ne donus la plej malgrandan kaŭzon, tion fari.

El « Pionier », tradukis Borozo.

cialajn kondiĉojn: la aparatoj devas havi eksterordinaran suprenvetureblon por rapide penetri la stratosferon, kiu ĉe la polusoj estas 9 km. alta sed iom post iom kreskas ĝis la ekvatoro kie ĝi estas 17 km. alta.

Ĝis nun tiu limo estas dufoje transirita de aviadiloj. La italo Pezzi flugis je iom pli ol 17 km., la usonano Stevens ĝis 22 km., tiel sufiĉe profunde en la stratosfero.

La unua homo kiu spiris ekster la teratmosfero, estas la fama svisa profesoro Auguste Piccard kiu en 1931 per sia libera balono suprenveturis ĝis ĉirkaŭ 16500 metroj kaj kies nomo por eterne estas ligita kun la ideo de stratosfero.

Sed sur tia gloro ne ripozas la vigla profesoro. Rompinte la glacieron de la stratosfero — parolmaniero kiu devas laŭvorte kompreniĝi, ĉar tie regas temperaturo de pli ol 50 gradoj sub nulo —, li jam ne interesiĝas pri tiuj ekstremaj altecoj kaj turnas sin al la ĝusta malo, la serĉado en la profunda maro, de la stratosfero al la batisfero (de la greka « bathys », profunda) estas lia plej nova devizo.

Denove li elpensis sian propran veturilon, kvazaŭ globforman arkeon, kiu tamen havas kelkajn principajn diferencojn de tiu de nia prapatro Noao. Unue ĝi povas laŭvole enprofundiĝi, alteriĝi sur la marfundo, aŭ senmove resti meze de la akvoj. Krome tiu oceanpilkego estas ekipita ne nur per la plej modernaj instaloj pri aerkondukiloj kaj artefarita spirado sed ankaŭ per lum- kaj filmaparatoj. Por kontraŭi la grandegan akvopremon en la pli profundaj profundajoj, la vandoj de la globo konsistas el ŝtalo dek centimetrojn dika. Por reguligi la situacion de alteco aŭ profundo oni devas enmeti grandan kvanton da oleo, (kiel sciante, oleo estas malpli peza ol akvo).

Piccard tiel esperas atingi profundegon, kiun ĝis nun neniu homa okulo vidis; li volas malsuprenveturi ĝis 9000 metroj sub la marnivelo.

Tradukis L. COURTINAT.

LUD. KRYSTA :

LA RABISTOJ

Kavaliro de Verceviĉ estis aŭstria vic-konsulo en Mostar, tiam, kiam Hercegovino ankoraŭ apartenis al Turkujo. Jen okazintaĵo, kiun Verceviĉ sciigis laŭ raporto de ĉeestintoj kaj laŭ propra sperto:

— Estis mezvintro kaj tiel malvarme, ke eĉ la okuloj kraketis pro frosto, — kie oni tie diradas. En la montaro ege amasiĝis la neĝo kaj ruliĝis lavange muĝante valen. La ventegoj tiel furiozis, ke ili ŝiris la arbojn de la radikoj kaj krakbatis per ili unu sur la alian. — Kiu en Hercegovino krucsignas sin (t. e. kristanoj), sidis ĉe la fajrujo kaj rostis sian vilan bruston. Feliĉa tiu kristano, kiu en tia tempo havas sian grenon en la korbo, — li povas kuraĝe atendi la printempon. Sed ve, kiu jam je kristnasko devas pruntepreni!

La turkoj fartas bone, ili estas nobeloj aŭ ne tributdevaj, — vivas en abundeco, kvazaŭ akaroj en lardo. Vintre en varmaj ejoj en silkaj kuŝenoj, ili fumas blondan tabakon, somere ili lasas ventumi al si malvarmigon per zefiro ĉe la bruetanta fonto. La turkoj preparolas inter si, kiom ili elprenos da tributo kaj tributrentumo de la kristanoj. La kristanoj, apenaŭ la frosto iomete mildiĝis, meditas pri raboekspedicioj. « Je Anunciacio, la 25-an de marto, anoncu sin, kiu volas partopreni, — timulaĉa estas, kiu ne havos kuraĝon; Sima Blagojeviĉ estos la hetmano. » Tiel Sima sciigis siajn kunulojn.

La 25-an de marto Sima inspekte priregardis sian anaron kaj parolis: Ni estas dudek naŭ, se ankoraŭ kelkaj aniĝos, des pli bone, — tridek kvar estas por bando la plej agrabla nombro. Se neniu plu venos, tiam ni devos ankaŭ per tiom sukcese, per Dia helpo. — En la tago de Sankta Georgo ni aniĝos sur tiu ĉi sama loko. Sed, tion mi diras al vi: kun solidaj

bataliloj, plenigitaj kartoĉzonoj: po du novaj ferajitaj muskedfusiloj estas nepre necesaj, unu paro da fortikaj ŝuoj sur la piedoj, dua paro en la ĉasosako; en la zono estu fajrilaro, oleobotelo, manĝaĵoj; — tion speciale ordoni mi opinias ne necese. Vi scias, ke la *rabisto* devas kondukti pie kaj konvene; je pasko li devas konfesi kaj partopreni la sanktan komunon, je Tomas-tago fasti kaj ne plu peki ok tagojn antaŭ la ŝormarŝo, ankaŭ ne kun sia propra edzino. Tiel ankaŭ vi devas kondukti, por ke nia afero estu benplena kaj vi hejmen venu sanaj. — Jen botolego da brando, trinku je mia sano kaj promesu per severa honorvorto, ke vi venos precize kaj plennombre en la tago de Sankta Georgo! Sed mi petas vin trifoje, de la ĉielo ĝis la tero, kaj sur la tero trifoje ĉiudirekten: prefere restu hejme. k'u de la vivo ne volonte disiĝos, pro kugloj kuregos, pri vundoj ploregos! » — Ĉiuj kapjesis, trinkis kaj vokis, ke ili konsentas. « Do adiaŭ! » vokis la hetmano.

Je Sankta Georgo, en la melkhorio aperis ĉiuj, gajaj kiel por edziĝfesto, kaj pretaj. Oni trinkis glaseton « je feliĉa reveno kun plenaj sakoj kaj brilaj polakoj (1). » Oni konsiliĝis, ĉe kiuj kunuloj oni sin ŝirmos kaj kaŝos, kiun turkan bienon oni atakos. « Neniun alian ni nun panos, ol en supra Hercegovino, en Nevesinje, la riĉan Arslan-Beg. Sur lia barilo blankiĝis la kranioj de multaj kristanoj, en liaj ĉirkaŭbaraĵoj paŝtiĝas la plej grasa bruto. » Bone, tiel estis decidate.

Ili elsendis observanton. Tiu ŝteliris inter la montoj al ilia plej servema helpanto. « Baku panon ĉi tiun nokton, ŝutu pajlon por tridek viroj, rostu du ŝafojn kaj

(1) Arĝentaj moneroj.

silentu! » El la bieneto de la helpanto oni povis bone vidi la turkokastelon. Sed oni ne povis dormi, kaj kiam la bando je noktomezo sekvis la gvidanton, ili ekmiris: la turkaj pordegoj estis malfermitaj plenangule, en la turka kastelo ĝojbruo, lumo kaj ridado: cento da turkoj festis la « ramadan ». Dum Ramadan, t. e. festmonato, la turkoj dormas tage kaj festas nokte. Sed kun cent turkoj, kiuj estas mal-dormaj kaj armitaj, eĉ la plej stulta ne ekbatalus. — Nur areton da bele selitaj ĉevaloj la hetmano per helpo de tri buboj tamen singardeme alportis el la turka baraĵo, kaj krome « kunkuris » bovino; tio estis ĉio.

Kion nun? Momenteton ripozi kaj dum la sama nokto rezigne foriri. Pli ne estas volebla. — Al la elĉerpitaj, kiel homoj estas post senfina marŝado, la momento fariĝas horo, la dormeto fariĝas dormego, kaj la nokto krepuskiĝas. Rapide donas la hetmano kiel dankon la bovinon al sia **mastro por gastigo kaj nutrado**, kaj la bando estas ĵus forironta, rapide, pro ĉielo, antaŭ ol la turkoj rimarkos la perdon de la ĉevaloj.

La observanto suprenrampis ĝis la pinto de abio, akre okulis, ĉu estas ankaŭ sendanĝere, jen!... Jen li ekscitite montras al la kastelo kaj ekrigardigas la kunulojn. El la kastelo promenas en la fruan matenon, senzorge, virinoj, knabinoj kaj knaboj. Unu nobela turkino, nevalita, kvar-kvin servistinoj kaj tri knaboj. Eble, ke, dum la ebriaj moslemoj dormas, feliĉege laciĝitaj pro nokta orgio, la virinoj volas klarigi al si la kapojn en la matena aero. Ĉar ankaŭ ili festis inter si la Ramadanon. Tiel ili paŝas trankvile, senzorge en la pejzaĝon; la suno ekleviĝas.

La spiono sur la abio akre rigardas kun malfermita buŝo, kaj en la bosketoj sidaĉas perplekse la rabistoj. Kiam la virinoj estis paŝintaj sufiĉe distance de la kastelo, murmuris la hetmano: « Al la laboro! » kaj mans'gnas al siaj tri intimuloj.

La virinoj sidis ĉe la puto kaj babilis, —

la knaboj saltetis en la rosfreŝa herbo. La inoj ne supozis ion malbonan, kiam la rabistoj alproksimiĝis: ili nur faligis la vualon, forturnis sin, kaŝis la manojn en la manikoj kaj silentiĝis, ĉar fremdulo ne aŭda la voĉon de honorinda virino kaj ne vidu ian parton de ŝia korpo. Sed kiam la rabistoj vokis: « Holahe!, antaŭen kaj kun ni! », la nobelino ekkriis, kvazaŭ ekfajfis mallonge, alte — kvazaŭ ŝi volus morti pro timo. La servistinoj ploregis kaj batis sin sur la bruston kaj ŝiris al si la harojn: « Ni estas kristaninoj, — la estro mortigos niajn patrojn kaj fratojn, se vi tuŝos la sinjorinan moŝton kaj la infanojn! » La hetmano ordonis: « Ne unu vorton, eĉ sonon! Ne timu pro la vivo kaj honoro, mi garantias per mia kredo. — Silente for kun ni! — Sed diru al mi, karaj servistinoj: Kiu estas la sinjorina moŝto? » — « La Arslan-Begovica kun siaj filetoj. » — « Do mi ne faris malbonan kapton. » — La Begovica kvazaŭ pereis pro honto kaj terurego.

Tiun tagon la gastoj de Arslan-Beg eble pli frue ol iam vekiĝis el dolĉa ripozo kaj kuregadis, rajdadis ĉiudirekten kiel neprudentuloj. — Ili nenion trovis, kaj nenium.

Dum la unua halto en la rokomontaro diris la hetmano al la servistinoj: « Kiu el vi estas la plej prudenta? » Kaj li elektis du. « Vi ambaŭ iru hejmen al Arslan-Beg kaj diru al li saluton de Sima Blagojeviĉ. Via edzino, vi diros al li, kaj viaj infanoj estas en la manoj de Dio kaj de la granda Sima, — ĉu oni povas esti en pli bonaj manoj? Pro tio Arslan-Beg ne zorgu eĉ unu minuton, la edzino kaj la infanoj revenos bonstate. — Sima ne marĉandos kun Arslan, sed Arslan ne volu kaŭzi doloron al li kaj al lia honoro per tro malgranda alaĉeta pago! » — La knabinoj iris. La rabistoj atendis kaj dormis. Nur unu spiono observadis.

Dum la nokto subite ekkriis la virinoj. La hetmano eksaltis armita per muskedo, kaj kiun li ekvidis en duonlumo, ankoraŭ rikanantan, sed jam tremegantan? Tomon

Kerkuljan, unu el la bando, la plej malbonan individuon. « Kio okazis, knabinoj? » demandis severe la hetmano. — « Jen vidu tiun homaĉon! » ili respondis. « Li sin alŝteliris, maldece alproksimiĝis! — Hetmano! Tiel vi plenumas la promeson? Tiel vi estimas la kredon? » — La hetmano mute levis la pafilon kaj paroligis la batalilon: meze en la koron de Tomo. — Tomo alten ĵetendis la brakojn kaj falis sur la vizaĝon. — Per la pafado ĉiuj vigliĝis. Sed la hetmano devis aparte laŭte kaj severe ordoni, ke oni enŝovelu la kadavron inter la arbetoj. « Ĉar tia hundaĉo », murmuris la buboj unuanime, « restu pli bone surtabligita por la vulturoj! »

Matene raportis la gardostaranto: « Unu karavano! »

Ĝi supren rampis malrapide la ŝtonplenan krutaĵon, kvar pelantoj kun sep muloj, peze ŝarĝitaj. Kiam ili proksimiĝis, oni vidis, ke estas turkaj servistoj. La hetmano renkonte sendis al ili gvidanton. La unua turko portis leteron, enĝitan en la supran fenditan finon de la grimbastono: « De mi, Arslan-Beg, al la hetmano Sima Blagojeviĉ kaj lia viraro saluton kaj pacon! La ambaŭ kristaninoj anoncis al mi, kiamaniere nia servistaro falis en vian potencon. Mi sendas al vi per miaj servistoj unu ŝarĝon da farano, krom tio kukfarunon, ses rostitajn ŝafojn, du felsakojn da vino, unu felsakon da brando, por ke vi trinku je mia sano; unu ŝarĝon da melonoj, por ke vi vin refreŝigu; unu sakon da kafo, unu da sukero; por ĉiu viro unu broditan ĉemizon el duonsilko kaj unu korpozono el ledo; por ĉiu unu paron da ŝuoj kaj unu broditan naztukon, por ke vi sciu, kun kiu vi interrilatas; por via hetmano verdan pelton, damaskenan spadon kaj por disdonado inter la viroj naŭdek naŭ hungarajn dukatojn, — mi ĵuras je mia bela kredo, ke mi momente ne havas pli da ili. Tion ĉion mi sendas al vi kun miaj plej bonaj deziroj, — kaj se tio al vi ŝajnas malmulte, miaj tri filetoj estas ĉe

vi; fortondu de ili po unu buketo kiel signon, ke ni volas eterne esti amikoj, baptopatroj kaj parencoj: mi, Arslan-Beg de Nevesinje, kaj la glora hetmano Sima Blagojeviĉ, — ĉar kun tia heroo mi volonte interfratiĝas. Feliĉon kaj benon por viaj bravuloj sur ĉiuj viaj vojoj kaj stratoj! »

La hetmano vokis: « Bonvolu veni al mi, nobelino, nun mia baptopatrino kaj fratino! kaj vi, knaboj, por ke viaj buketoj, falu! » La hetmano detranĉis de la plej aĝa knabo tufeton, Paja Maliĉ de la dua, kaj Mitar Maliĉ de la plej juna. Ili festmanĝis gaje, kaj ĉiu baptopatro donacis al sia baptofilo unu dukaton. — Pest la manĝo la virinoj kaj infanoj iris al la muloj kaj surdoriĝis sin. Dum la adiaŭo parolis la hetmano: « Fartu bone, fratino — fartu bone ankaŭ vi, knabinoj kaj baptopatroj! Nur Arslan-Beg volu pruntedoni al mi kvin mulojn, por ke mi povu forporti liajn donacojn. Iun tagon li trovos la mulojn ree en sia stalo! »

Tiel ankaŭ okazis. — Neniam plu iu rabisto atakis la kastelon de Arslan-Beg aŭ atencis lian brutaron aŭ servistaron.

Sima Blagojeviĉ mortis en aĝo de naŭdek du jaroj en la jaro 1853 kiel vilaĝestro de sia hejmvilaĝo.

Rakontis *Lud. Krysta*.

RIDO SANIGAS

ANTIKAJ PENTRAĴOJ

— Mi havas hejme kelkajn valoregajn antikvajn pentraĵojn.

— El kiu tempo?

— El la tempo, kiam mi ankoraŭ havis monon.

KIAL? — TIAL!

Komisiono inspektas la malliberejon. La estro de la komisiono al unu el la malliberuloj:

— Kial vi sidas ĉi tie?

— Tial ke la kradoj estas tiel fortikaj, kaj la pordoj estas ŝlositaj.

RAPIDA RIMEDO

Anna: Mi diris al li ke estus pli bone, se ni ne plu vidus unu la alian.

Mia: Kaj kion li faris?

Anna: Li estingis la lumon.

Internacia Esperanto-Ligo

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 102. 4an de Januaro, 1939.

NOVAJ DELEGITOJ.

Brazilo

Araguari. D : O. Naves, Rua Goiaz, 11, Araguari, Minas Gerais.

Pôrto Alegre. D : B. Camozato, Rua dos Andradas 1431, Pôrto Alegre, Rio Grande Sul.

Recife. VD : O. Vidal de Araujo, Rua do Príncipe, 398.

FD (Kuracistaj aferoj) : D-ro A. de Araujo Lins, Rua Hernandes Vieira, 321.

FD (Presado) : A. Pessoa de Carvalho, Rua do Sossêgo, 301.

FD (Virinaj aferoj) : F-ino A. Vidal de Araujo, Rua do Príncipe, 398.

Sao Paulo. FD (Filatelijo) : F-ino M. L. de Moraes, Rua Maestro Cardim, 495.

FD (Muziko) : F-ino M. O. Jovino, Rua Vergueiro, 656.

Danujo

Aalborg. FD (Asekuro) : T. Aardestrup, « Fremtiden », Aalborg.

Skodsborg. D : F-ino I. Christensen, « Lillegaarden », Frydenlundsvej 5.

Hispanujo

Barcelona. FD (Juelarto) : J. Gili Norta, Cornet i Mas 43, 3-er.

Jugoslavujo

Sarajevo. D : A. David, Zemaljska Banka, Sarajevo IV.

Tuzla. FD (Instruistaj aferoj) : R. Peleš, Tuzla, Drinska Canusejo.

Portugalujo

Marinha Grande. D : J. Saraiva Martins, Avenida Conde de Azarujinha.

SANGOJ.

Belgujo

Ternat. D : P. Stappers, Brusselsche Steenweg 23.

Brazilo

Recife. D : adresŝanĝo : Rua da Alfândega 35.

Ĉeĥoslovakujo

Brno. FD (Instruistaj aferoj) : vakas.

Hungarujo

Budapest. FD (Fervojistaj aferoj ktp.) : vakas pro translokiĝo.

Nov-Zelando

Whangarei. D : nova adreso : 15, Bernard Street.

Svislando

Bern. D : M. Ardüser, Effingerstrasse 67.
VD : L. Weber, Breitenrainstrasse 81.

Usono

Bryan (Texas). D : nova adreso : 609, E. 26 th. Street.

Los Angeles (Cal.). VD : nova adreso : 212, So. Grand Ave.

MEMBRO SUBTENANTOJ.

Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenantoj :
24. S-ro L. A. Churchill, Derby, Anglujo.
25. S-ro P. Lebrun, Kreuzlingen, Svisujo.

MONATA STATISTIKO.

Membraro.

Jep la stato de la membraro je la fino de la jaro 1938 :

Asociaj Membroj ... 9983

Individuaj Membroj :

MJ 1433

MA 1076

MAH 302

MS 132

Patronoj 11

DM 73

HM 30

3057

13040 en 61 landoj.

Korespondajoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Decembro, 1938 :

Ricevitaj 733

Senditaj 1977

2710

Dum la jaro 1938 (sen la gazetoj) :

Ricevitaj 8791

Senditaj 20653

29444

Cecil C. GOLDSMITH.
Generala Sekretario.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 103. 11an de Januaro, 1939.

NOVAJ DELEGITOJ.

Ĉeĥoslovakujo

Kostelec n/Lab. D : L. Krisl, Direktoro de
stata burĝlernejo.

Estonujo

Pärnu. D : J. Simson, Rua mnt. 76.

Finnlando

Viipuri. VD : E. A. Tulkki, Pontuksenk. 36,
B, 19.

Hispanujo

Barcelona. FD (Fervojoj aferoj) : S. Alberic-
Jofrè, Rambla de Prat, 1, 3-er, 2-a.Ripoliet. D : A. Valls i Roviralta, Str. Montu-
riol 12.Sailent. D : F-ino D. Tardà Quintana, Carrer
del Cos, 2.Terrassa. D : M. Junyent Badrinas, Surís n. 25.
VD : Fr. Puig Puig, Treneo str. 4, 2-a.

Jugoslavujo

Lipolist. D : B. Marinković, Lipolist, p. Šabac.
FD (Turismo) : La D.Slavonski Brod. VD : M. Demetrovič, Mesičeva
ulica 72.

Subotica. D : L. Alt, Senoe ulica 21.

Zagreb. FD (Agronomio) : inĝ. B. Borjan,
Kačićeva ul. 9.

Portugalujo

Leiria. D : J. Garcia Ferreira Múrias, Sto.
Estêvão.

SANGOJ.

Britujo

Londono. FD (Elektro-tekniko) : adresŝanĝo :
« Happy Landings », Friary Road, Wray-
sbury, Bucks.

Ĉeĥoslovakujo

Lom u Mostu. D : vakas pro translokiĝo.

Nederlando

Scheveningen. D : S-ino J. G. Bramkamp-
Weber, 22, Pansierstraat.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

- Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenantoj :
26. S-ro W. Bailey, Penrhyn Bay, Anglujo.
 27. S-ro F. H. Lockyer, Liverpool, Anglujo.
 28. S-ro A. McDonald, London, Anglujo.
 29. S-ro G. H. Parker, London, Anglujo.
 30. S-ro G. L. Preedy, Reading, Anglujo.
 31. S-ro R. Robertson, London, Anglujo.
 32. S-ro I. H. Wright, Birmingham, Anglujo.

FAKAJ ASOCIOJ.

Interkonsento pri kunlaboro, laŭ par. 13 de
la Statuto, estas farita kun :

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperant-
istaj (T.A.G.E.).

Cecil C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 104. 18an de Januaro, 1939.

NOVAJ DELEGITOJ.

Argentino

Bell Ville. D : A. Schneider, Escuela de Artes
y Oficios, Bell Ville (Córdoba).Carlos Pellegrini. D : Jaime Olives (hijo),
Carlos Pellegrini (Santa Fé).San Isidro. D : D-ro M. H. Catalano, Olegario
Andrade 113, San Isidro (Buenos Aires).

Danujo

Norre-Alslev. D : S. A. Andersen, Sundby,
Norre-Alslev (Folster).

Hispanujo

Barcelona. FD : (Ĵurnalismo) : F. Pujulà, Con-
sell de Cent, 369, 2n, 2a.Pla de Besós. D : J. Ibern Vinyals, Grupo-
Escolar « M. Servet », Pla de Besós (Bar-
celona).Santa Coloma de Farnés. D : J. Gener, Clavé
25, Santa Coloma de Farnés (Catalunya).

Portugalujo

Lisboa. FD (Blindulaj aferoj) : A. Pereira,
Azilo-Escola António de Castilho, Rua Cor-
reia Teles.

Svedujo

Agnesberg. D : K. Lindström, Agnesberg (Väs-
tergötland).

Landskrona. D : E. Sörensson, Prästgatan 8.

SANGOJ.

Argentino

Esperanza. D : vakas pro translokiĝo.

Britujo

St. Albans. D : adres-ŝanĝo : 9 Beechwood
Avenue.Sca. borough. D : adres-ŝanĝo : « Gledholme »,
Mill Lane, Clayton Bay.

Danujo

Aarhus. FD (Komerco) : vakas.

Ringköbing. D : vakas.

Svedujo

Malmö. D : adres-ŝanĝo : S. Förstadsgatan 23c.

PATRONO.

Afable aliĝis kiel Patrono por 1939 :

9. D-ro R. H. Crowley, Tewin, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

- Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenantoj :
33. F-ino A. L. Borel, London, Anglujo.
 34. D-rino E. Evans, Bangor, Kimrujo.
 35. S-ro H. Ingham, Chestertield, Anglujo.
 36. J. H. Lloyd, Birmingham, Anglujo.
 37. G. W. Roome, Sheffield, Anglujo.

Cecil C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

ONI ANONCAS

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 0.60 ned. guldeno, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turmu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtgiro 1306.30**

(s-Gravenhage). Familiaj anoncoj senpage.

Naskiĝo. Ges-roj Joh. M. Duinker kaj E. Duinker-Keijser, Parkstraat 5, Den Burg (Texel), Nederlando, informis nin pri la naskiĝo de filino, nomita Willy Johanna. — Nian koran gratulon!

Gefianĉiĝo Goddard-Bailey. Esperanto unuigas: Gefianĉiĝis f-ino Mary Goddard, kaj s-ro Louis Bailey, ambaŭ fervoraj membroj de la Esperantogrupo « Ĉiam antaŭen » en Leicester, Anglujo. Ni kore gratulas!

Geedziĝo Tuinder-Langereis. Geedziĝis s-ro H. J. Tuinder, del. de IEL en **Scrubelawan**, Nederlanda Hindio, kaj f-ino Anneke Langereis, Pem. Siantar, Ned. Hindio. — Niajn korajn bondezirojn!

Geedziĝo Brunskog-Jansson. Karlhugo Brunskog edzinigis Susanne Jansson, en **Lidingö**, Svedujo, la 24-an de decembro 1938. — Nian plej koran gratulon!

Geedziĝo Turner-Blomquist. La 26.12.1938 okazis en **Nya Varvet**, Svedujo, la geedziĝo de Fred. H. Turner, antaŭa IEL-delegito en Rochester, Anglujo, kun Stina Blomquist, sekr. de la klubo « La Ondo » en Nya Varvet. La novgeedzoj loĝos en Linköping, Svedujo. — Ni gratulas plej kore.

Distingo. Nia konata franca pioniro, la prezidanto de SFPE, s-ro Ernest Archdéacon, en **Saint-Cloud**, Francujo estas ordenita per la rozeto de Oficiro de la Honora Legio, pro siaj meritoj pri aviado kaj pri Esperanto. — Plej koran gratulon!

Letervespero. La laboresperantoklubo « La Norda Stelo » okazigos letervesperon la 9-an de februaro. Sendu leterojn! Certa respondo. — Leo Nielsen, Kjellerupgade 2, III., **Aalborg**, Danujo.

Poŝtkartvespero. La Esperanto-Klubo en Motala, Svedujo, aranĝos la 10-an de februaro 1939 poŝtkartvesperon, kaj samtempe festos sian dek-jaran ekzistadon. Sendu kartojn al la jubileo! Certa respondo. Adresu per ĝardenisto Carl Hallros, IEL-delegito, Bispmotala Handelsträdgård, **Motala**, Svedujo.

Letervespero. Amika grupo de 40 ge-Zamenhofanoj, kune kun kursfininteĵ, aranĝas letervesperon la 25-an de februaro. Skribu amase! Almenaŭ unufojan respondon solene garantias: S-ro A. Sanik, Królewska 13, **Lublin**, Polujo.

Letervesperon okazigos la 27-an de februaro la kursanaro en Moia. Taŭga okazo bone propagandi Esperanton kaj atingi terovorajn ge-esperantistojn kiel korespondantojn (preskaŭ ĉiuj estas membroj-abonantoj de IEL). Skribu el la tuta mondo kaj sendu Esperantaĵojn al la kursestro R. Molera, Catalunya 13, **Moia (Barcelona)**, Hispanujo.

Al la ĝeinstruistoj! — S. Kubo, japana samideano, studanta belart-edukon inter infanoj, petas helpo de ĝeinstruistoj de ĉiuj landoj, por interŝanĝi infanajn desegnaĵojn de elementa kaj mezgrada lernejoj kun japanaj. Ĝeinstruistoj interesitaj bonvole skribu al (ĝis februaro): S. Kubo, Maison du Japon, Cité Universitaire, **Paris 14**, Francujo, — donante la nombron da desegnaĵoj dezirataj kaj proksimuman aĝon de infanoj. Post ricevo de japanaj desegnaĵoj, sendu al supreskribita adreso. (Post la 10-a de marto, al: S. Kubo, 18, Sadohara 3-tyome, Utsugome, **Tokyo**, Japanujo. (565))

Kongresa biciklado. Kiu interesiĝas pri bicikla ekskurso antaŭ, dum, aŭ post la Berna aŭ Kopenhaga kongreso, bonvolu skribi, senprokraste, al: John Conroy, 21, Devonshire Drive, Mickleover, **Derby**, Anglujo. — Li penas aranĝi tian bicikladon.

La B'iblio estas la libro plej legata, plej disvastigita. Por ricevi, senpage, parton el ĝi, skribu al: La Domo de la Biblio, Dept. A.B.I., **Genève**, Svislando. (566)

Konatiĝu kun abstineca movado! Volonte sendas sian 52-paĝan verkon pri tiu ĉi aktuala internacia demando je 2 internaciaj respond-kuponoj staci-stro H. Salokannel, **Uusikaupunki**, Finnlando.

Izola latva samideano, delegito de IEL, serĉas amikinojn. Edzeco eventuala. Augusts Neselbergs, Pasta iela 52, Jelgava, Latvio.

Universala Kongreso de Esperanto 1939 Bern Germanoj, kiuj i-tencas ĉeesti la kongreson en Bern, estas petataj demandi plifaciligajn rilate devisaĵojn ĉe s-ro M. Arduser, Effingerstr. 67.

Bern (ano de LKK). (559)

22-jara dom-ornamisto deziras korespondi kun sammetiaj alilandanoj, kiuj ĉeestos la Bernan Kongreson. — C. Ambroso Parkyn, 28, Park Crest., Knaresborough, Anglujo.

23 gekursanoj en la sveda ĉefurbo deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata. Skribu al la kursgvtdanto s-ro Sigvard Hakansson, Asögatan 148, Stockholm, Svedujo.

Deziras korespondi per letere, prefere kun ne-ĉiuj landoj. Interesiĝas pri naturobservado, popolkutimoj kaj pentroarto. S-ro Ant. De Troeyer, librotenisto, Vrijheid 98, Arendonck, Belgujo.

Juna samideano deziras korespondi kun la tuta mondo ĉiokaze de Nederlando kaj Francujo. S-ro René Wouters, Davies, Arendonck, Belgujo.

Serĉas eksterlandajn korespondantojn gesperantistoj el Belgujo. Ni certigas respondon. Skribu al Albert Luyten, Bergstraat 93, Heist-op-den-Berg, Belgujo.

50 junaj lernantoj (14-17 j.) deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj. Ĉiam respondos. Skribu al : Ecole Supérieure, Section Esperanto, Perpignan, Francujo.

Rigardu ĉi tien! Kie troviĝas sola esperantistino, kiu volas korespondi kun same sola esperantisto? Eventuala geedzeco. Skribu al s-ro Ingemar Lindström, Sörnoret, Aale, Svedujo.

Svedino, instruistino de lingvoj, deziras korespondon en Esperanto, franca, angla, germana aŭ hispana, kun samideanoj. — Fino Britta Edlén, Ynglingagatan 3, V., Stockholm, Svedujo.

Policisto deziras korespondi per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj kun samideanoj en ĉiuj landoj. Certe respondos. — Cornelis Joh. van der Kolk, Jan Maurits van Nassaustraät 3, Tilburg, Nederlando.

Cor van Baal, dĝogisto, deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj. Skribu je mia 25-a naskiĝtago, la 10-a de februaro! Mi respondos certe. Adreso : Lange Kerkstraat, Terneuzen, Nederlando.

Juna svedo deziras korespondi kun la tuta mondo. Sinjoro Bror Hjort, Angturbin, Saltsjö-Järna, Svedujo.

Esperantistoj en ĉiuj landoj! Du 20-jaraj svedaj esperantistoj deziras korespondi. S-ro Edvin Andersson, Södra Råm, Molkom, Svedujo; s-ro Hugo Olsson, Box 19, Deje, Svedujo.

Ni deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj aŭ leteroj, pri ĉiuj temoj. — Martin Fjeldberg, Husklepp, Ad 1 st.; kaj : Olav Haug, Ba kaaker st.; ambaŭ en N. rvegujo.

Poŝtmarkoj! Sendu al mi 50-100 poŝtmarkojn, kaj vi ricevos samkvanton da svedaj. S-ro Sven Sundin, Fredagsgatan 9 M Imö, Svedujo.

Poŝtmarksanĝo (peco kontraŭ peco aŭ laŭ marko-listo Yver, Senf, Michel). Aerpoŝtafranko kontraŭ aerpoŝtafranko. Rekomendita letero. Mi sendas : Svedio, Danio, Norvegio, Finnlando. Tuj responde. S-ro H. Westerdahl, Lilla gränd 8, Enskede, Svedujo.

Poŝtmarkojn intersanĝas kun seriozaj filatelistoj. Por 500-5000 ĉiam sendos saman kvanton aŭ samvalorajn laŭ Michel. Sendu al : Z. Székely, Pest zendörincz, Kossuth u., Hungaruj. (Delegito de IEL.) (567)

Mi volas intersanĝi poŝtmarkojn kun seriozaj kolektantoj. L. Wozarik, VII. Rottenbiller-u. 12, Budapest, Hungarujo.

Aerpoŝton el la tuta mondo aĉetos aŭ intersanĝos : S-ro J. Helebrant, Trojická 11, Praha II, Ĉeĥoslovakio. Aŭfranku filatelic!

Intersanĝo. Mi deziras intersanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj, ankaŭ grandkvante. Certe respondos. Arvid Bengtsson, Kindsboda, Svedujo.

15-jara sveda esperantisto serĉas korespondanton en la tuta mondo. Respondu al Erling Gustavsson, Ytterön, Torhamn Svedujo.

Interesa intersanĝo. Sendu kvanton da bonaj uzitaj aŭ neuzitaj poŝtmarkoj, kaj mi sendos al vi ilustritan modelkajeron de manlaboraĵoj kun esperantaj konsiloj. Instruistino Tyne Salokannel, Uusikaupunki, Finnlando.

DENOVE HAVEBLA

estas la 128-paĝa, tre klare presita, kaj eleganta broŝurita volumo, kiu aperis en 1935 sub la titolo

La Multekolora Libro

Ĝi estas eldonita laŭ iniciato de japana samideano Kenji Tachibana, kaj ĝi enhavas 58 plej variajn legajojn de diverslandaj aŭtoroj: rakontojn, popularsciencajn artikolojn, versaĵojn, spritaĵojn, sentencojn, ktp., do ion por ĉiu gusto, en lingvo modela kaj plurfoje kontrolita. Ankaŭ nomita « La intelekta legolibro ».

Prezo nur 0.75 gld., inkluzive de sendkostoj.

∴ Ambaŭ lingve perfektaj libroj estas riceveblaj de la eldonejo ∴
HEROLDO DE ESPERANTO, SCHEVENINGEN (Nederlando)
kaj ankaŭ de Internacia Esperanto-Ligo, Rickmansworth (Anglujo).

Nun ricevebla ankaŭ bindita

estas la originale verkita en Esperanto, interesa kaj bonstila romano de R. Meye :

LA LONGA VOJO

kiu en 14 ĉapitroj priskribas la aventuran vivon de du amikoj-vagabondoj. « La longo vojo » signifas la soseon, sur kiu ili pasigas la pli grandan parton de sia vivo.

La libro estas verkita en simpla stilo, kiel konvenas por ĝia enhavo; ĝia lingvo estas laŭdita pro sia korekteco. Tial ĝi egale bone taŭgas por komencantoj kiel por progresintoj. La broŝurita eldono kostas gld. 1.20; la bindita eldono, kun bela ŝirinkovrilo, kostas gld. 1.80. Sed :

Kiu mendos la binditan eldonon ĝis la fino de februaro (ekstereŭropanoj ĝis la fino de marto), ricevos ĝin por gld. 1.50, inkl. de sendkostoj.

